

Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

<http://www.districto.com/esperanto/k40.htm>

<http://www.dragonfire.net/~Esperanto/k40.htm>

Djur Djura



Mediterraneo Kiel ponto inter-kulturoj



"Asirem"



Himnoj.


Al-Andalus, brila ponto.

N° 40

Septembro/decembro 1998

Kajeroj

el la Sudo



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Prezidanto: María del Mar Guirao Gallego

*Avd^o Juan Carlos I, 22-8^o-H,
30800 LORCA (Murcia)
Hispanio.*

Sekretario: José Pina Tuells,
*c/ St^a Teresa, 22-2^o CD,
ES30005 MURCIA*

Libroservo: Nicolás Gil Carballo,
*Apartado 305
ES24080 LEÓN*

Redaktoro: Jesuo de las Heras,
*Apartado 4461
ES30080 MURCIA*

Vicprezidanto: Ankoraŭ neniu oficas.

Kasisto: José María Bernabéu Franco
*Gral. Primo de Rivera, 8
E-03360 Callosa de Segura,
ALICANTE (Hispanio).*

*Monsendo de kotizoj kaj abonoj al la
nova konto n^o 1302 0412 86
0022655110 en libreta de Caja Postal.
Sen aldona kosto. La abono kostas
1000 pesetojn aŭ 6 eŭrojn. Kvintancon
oni ricevas.*

*Pretigas la Kajeron:
Provokorekto: José Pina Tuells,
Administro: Juan Antonio Cabezas
Martínez,
Redakto: Jesús de las Heras Jiménez.*

Kovrilo: Ĝurgura, la muzikgrupo pri kiu ni parolis en nia lasta numero, eldonis belajn diskojn pri berbera muziko, kiujn ni rekomendas, eĉ se oni ne parolas tiun lingvon, pri ĝia beleco kaj ankaŭ pro la persona batalo de Ĝura, ĝia gvidanto.

Ne subskribitajn
artikolojn verkis la
redaktoro

Oni povas
reprodukti
artikolojn,
kondice ke
oni citu la
originon.

Enhavo

Al-Andalus, brila Mediteranea ponto inter kulturoj	5
Djur Djura	21
Letero el pasinto	22
Kongresa temo 83-a: Mediteraneo, ponto inter kulturoj	24
Andalusa muziko	28
Sociala salajro	30
Verkante, pensante	31
Himnoj,	33
Enkonduko en muziko: prezento	35

*Ni ne korespondos
pri nepetitaj artikoloj.
Tamen, ni klopodos
publikigi ĉiun artikolo-
n kies enhavo estas
interesa kaj ne mis-
traktas iun ajn per-
sonon.*

*Pri la enhavo de
la artikoloj
respondecas la
aŭtoroj mem, ne la
redakcio.*

Redaktore

Jen ni denove post la someraj kongresoj kaj feriado. Eble surprizos vin, ke nia organo aperas en septembro, anstataŭ en oktobro, kiel kutime. Kelkaj samideanoj signalis, ke nia bulteno povus esti dumonata, sed tio povas esti nur kondiĉe, ke kunlaborantoj sendas siajn kolaboraciojn sufiĉe frue por printi ilin en nia magazino. Ĉifoje tio eblis, ĉar estas longega artikolo-prelego de nia kamarado Antonio Marco Botella, kiun ni publikigas tute ĉar oni ne povis aŭskulti ĝin en la Kongreso Universala de UEA (83-a), pro manko da sano de la preleganto. Ĝi parolas pri nia pasinto, kiun oni elrabis ĉar tiuepoke hispanoj estis muslimoj.

La reston de la Kongresa Temo (*Mediteraneo: ĉu ponto inter kulturoj?*) mi mem recenzis je paĝo 24-a. Se estas malkonsentoj pri miaj opinioj, mi esperas viajn artikolojn defendante viajn vidpunktojn.

Interesa nova serio komenciĝas en la antaŭlasta paĝo, **Enkonduko en muziko**. Mi es-

peras, ke la serio allogu vian atenton.

Stranga, ĉarma muziko estas tiu de Ĝurgura, prezentita — traduke, kompreneble — en paĝo 21. Gvidkantisto en tiu grupo estas tiu virino, Ĝura, kiu verkis la libron ***Vualon de l' silento***, kiun ni recenzis la lastan numeron.

Giordano Moya parolas al ni denove pri sia alloga ideo, *tutmondiĝo*, kiu solvos laboristajn problemojn.

Se vi iam demandis al vi pri kiujn karakterizojn devas havi via verko, por ke ĝi iĝas mondfama, eble vi trovos respondon en tiu artikolo de Olga López, *Verkante, pensante*.

Himnoj temas pri tiuj emblemoj sonaj de landoj, kaj ties problemoj rilate al esperantistoj. Ankaŭ muzika eseo estas *Andalusa muziko*, kiu ne sole referas al Andaluzio.

Mi esperas, ke vi trovu la legadon de tiu ĉi **Kajero** amuza kaj pensiga, kaj se io en ĝi levigas vian kontraŭan opinion, mi volonte konsideros vian artikolon por publikigo.

Ĝis!

Informoj de la Prezidanto



Mi bedaŭras, ke mi estis tiel dura je mia unua informo al haleanoj. Mi devis gratuli mian antaŭulon pro sia sindonema, longa kaj interesiga agado kiel prezidanto dum kvar jaroj, malgraŭ tio, ke estante emerita, anstataŭ libertempi kaj ripozi, li alfrontis la defion levigi nian asocion ĝis la alta nivelo kia mi heredis ĝin. Pro tio nur ĝentilajn vortojn mi povas diri pri la agado de Marteno Bustino Benito. Kvankam mi ankoraŭ volas eksprezidantiĝi, tio estas ĉefe, ĉar mi ne kredas, ke mi povas daŭrigi lian agadon je la sama nivelo. Tamen, mi klopodos fari ĉion, kion mi povos por ke Hale malstagnu. Tiudirekte, oni starigos novajn kursojn, ne sole pri Esperanto, sed ankaŭ pri Hale; por ke ni haleanoj lernu pri kio estas Hale, por kio oni kreis ĝin, kaj kio estas la esenco de Hale. Mi konsilas al ĉiuj legantoj kiuj povas, ke vi venu al la Kongreso VEFa de Lorko (la 13.-an de marto 1999), kiam la unuan prelegon pri tiu temo estos dirata.

Amike kaj kamaradece salutas vin,

Maria del Mar.

Al-Andalus¹, brila Mediteranea ponto inter kulturoj

Gesamideanoj kaj amikoj:



La organizantoj de tiu ĉi programero, invitis min prelegi pri historia temo kaj provi rilati al miaj argumentoj la kongresa temo, *Mediteraneo — Ponto inter kulturoj*. Kaj en tiu linio

prezenti al vi, laŭ mia imago, la periodon de la iama Al-Andalus. Kiel aldono al tiu specifa temo historia, ili proponas: *eventuale kiel indikon por la estonteco de la nunaj socioj loĝantaj ĉirkaŭ Mediteraneo*.

La temo tiel proponita estas iom pli ol kompleksa, ĉar ĝi postulas ne nur rigoran priskribon de historiaj eventoj, sed ankaŭ grandan imagokapablon por translokigi la indikojn profiteblajn de mia historia rakonto al la nuna realo kaj al la estonteco de la apudmediteraneaj socioj. Tiu dua parto postulus pli da tempo kaj specifan scion pri la modernaj socioj, ĉar ni devus transsalti de la mezepoko, de viveroj kaj pensomanieroj de antaŭ pluraj jarcentoj pri kiuj mi emas okupiĝi, al tiu aktuala kun forta akcento socipolitika de la nuntempo, kiam la modernaj teknikoj pri interkomunikado flugas super maroj kaj oceanoj. Tio tute ne signifas, ke ni devas definitive deflankigi tiun duan parton, tute ne, sed

¹Prononcu al anda lus.

sendube konvenas prokrasti ties komentojn kaj eventualajn debatojn por venontaj tagoj, kaj se eble, por pritrakto en speciala forumo.

Mi rezignas, do, komenti tiun duan paragrafon de la prelego-propono, kiu eble devojigis nian disertacion, de la kampo historia al tiu de la nuntempo, tial mi alĝustigos mian prelegon al tiu de la kongresa temo kaj konkretos ĝin al la parto historia kaj kultura de Al-Andalus, kaj kiel sola indiko de la dua parto proponita de la organizantoj, nur la elmontron kiel ĝi funkciis kiel interkomunikilo de la kulturo de oriento kaj alporto de ĝiaj plej puraj esencoj al okcidento, sed sen tro detala profundigo. Kaj antaŭ ol eniri en la kernon de mia prelego mi devas emfazi, ke mi estas nek profesia historiisto nek arabisto, do mi traktos la temon el vidpunkto de studemulo, kiu jam de antaŭ multaj jaroj sin sentis allogita de tiu periodo de nia historio, ne tro konata kaj ofte eĉ miskomprenata. Kaj la sola novaĵo de mia prelego povas konsisti, el mia versio pri tiu civilizacio sub vidpunkto de la arabaj verkistoj kaj aliaj fakaj studemuloj de ne gravas kiu parto el la mondo.

Kaj tio ne devas skandali iun ajn, malsamaj versioj ekzistas pri samaj faktoj, ja ni ĉiuj konsentas pri la simpla difino de la koncepto historio *kiel rememoro de realaj faktoj iam okazintaj*,

sed ankaŭ estas ĝenerale akceptitaj, diversaj interpretoj pri samaj faktoj, ĝis tia punkto, ke se rakontite de unu aŭ alia, la konkludoj povas esti tute malsamaj. Tia estas la kazo pri Al-Andalus, kiu, se rakontite de okcidentaj historiistoj, temas pri geopolitika konkero de Iberio kiel rezulto de ekspansia politiko de araboj, kaj laŭ versio de mezorientaj araboj kaj aliaj kompetentaj fakuloj temas pri ekspansio kun forta influo religia, kies plej grava rezulto estis la kreo de unika civilizacio sur iberaj teritorioj, tute nekomparebla al iu ajn alia, ĉar el simbiozo de la kulturoj hispana-latina, araba kaj juda fruktis la al-andalusa, daŭrinta ok jarcentoj, kiu provizis al Okcidento per bazaj priscienciaj scioj, kiuj daŭre viglas en la fundamentoj de la okcidenta civilizacio.

Tuj post la klarigo kaj karaktero de mia prelego, mi citas kiel komencodaton de mia studaĵo la jaron 632-an, forpaso de la profeto de islamo, Mahometo, kaj momento kiam komenciĝas la ekspansio de la muzulmanoj, orienten al Azio, okcidenten por la regado de Mediteraneo.

En la jaro 708-a, kun la konkero de Tanĝero (nuna Maroko) fare de la trupoj komanditaj de Mŭsa ibn Nusayr, la tuta Nord-Afriko, de Egipto ĝis Atlantiko, restis sub la kontrolo de la arabaj trupoj. Eble por kompletigi tiun kvazaŭ revon, ankoraŭ mankis la konkero de Iberio, kies fabelaj riĉaĵoj, tiel proksimaj, allogis la arabojn kaj iamaniere invitis ilin al okupado. La historio de la alveno de araboj en *Hispania* estas plena de legendaj epizodoj tre malfacile proveblaj, sed kun eksterordinara beletra beleco, en

kiuj amo kaj perfido, malamo kaj morto, rolas kiel protagonistoj de historiaj eventoj, tiel altirfortaj, ke belaj pecoj el ili aperis post jarcentoj kaj jarcentoj en la hispanaj kristanaj anonimaj kanzonaro kaj romancaro...

Sed ni revenu al la mondo de la historiaj faktoj por konstato, ke en la jaro 710-a, laŭŝajne, generalo Mŭsa ibn Nusayr ordonis sian subkomandanton Tāriq ibn Zuirad translokiĝi al Hispanio kun cent rajdantaj soldatoj kaj 400 infanteriaj en esplora misio, de kie ili revenis kun abundaj riĉaĵoj kaj tre bonaj impresoj por eventuala invado de tiuj teritorioj. Kiel sekvo de tiu esploro, generalo Mŭsa ordonis la invadon de Hispanio, tiam regata de gotoj, kaj estis denove Tārik, kiu en la jaro 711-a, komandante 9 000 berberajn soldatojn, elŝipiĝis sur hispanan teron okupante fortikaĵon, kiu ricevis sian nomon (Chabal Tārik), hodiaŭ konata kiel Ĝibraltaro.

Apenaŭ Don Rodrigo, reĝo de gotoj, batalanta en tiu momento ĉe la nordo de Hispanio, eksciis pri tiu invado, marŝis rapide suden kun sia armeo konsistanta el 50 000 ĝis 100 000 soldatoj, kaj trovis la malamikon apud rivero Barbate aŭ Guadalete (Wādi-Lakka por araboj) kie, eble, okazis granda batalo kaj Don Rodrigo estis venkata kaj mortigata. Ŝajne tiu terura batalo pri kiu parolas la kristanaj kronikoj neniam okazis, ĉar komandante ambaŭ flankojn de la armeo de Don Rodrigo estis Don Julián kaj Sisberto, fratoj de la forpasinta gota reĝo Witiza, kies filo Añila (tro juna ankoraŭ por funkcii kiel reĝon kaj ĉefon de la armeo) pretendis la tronon okupitan de

Don Rodrigo. Kiam komenciĝis la menciita batalo, ambaŭ fratoj dezertis el la gota armeo kaj batalis kun la trupoj de Tāriq, tial, la armeo de Don Rodrigo restis strategie rompata kaj siaj trupoj facile venkataj kaj li mem mortigata.

La legendo diras, ke Don Julián Oppas, gubernatoro de Ceŭto, havis filinon nomatan *La Cava*, kiu estis logita kaj sekse perfortigita de Don Rodrigo. Kiel venĝon, Don Julián sugestis al la araboj invadi Hispanion kaj promesis ilin provizi de sufiĉe da ŝipoj kaj li mem partopreni en la batalo kontraŭ la gota reĝo.

Post tiu batalo aŭ eble bataleto, Tāriq konstatis, ke ne plu restis serioza kolektivo da soldatoj kiel eventuala malamiko, kaj kun la konsento de siaj generaloj, sed sen la permeso de sia estro Mŭsa, daŭrigis la okupadon de hispanaj urboj, sen kontraŭstaro, ĝis atingi Toledo-n, la tiama hispana ĉefurbo.

Informita Mŭsa ibn Nusayr pri la sukceso de Tāriq sur iberaj teritorioj, kaj ambiciante similajn gloron kaj riĉaĵon kiel tiuj de sia subkomandanto, li decidis partopreni en tiu kampanjo kaj en la jaro 712-a elŝipiĝis tiucele komandante 18 000 soldatoj, grandparte el ili araboj, kaj sekvante alian itineron ol tiu de Tāriq, atingis Toledon post okupi diversajn gravajn urbojn ĉe la sudo de Hispanio. En Toledo ambaŭ militistoj renkontiĝis kaj konsentis pri la strategio de la sekvanta kampanjo. La rapida okupado de hispanaj urboj fare de la trupoj, unue komanditaj de Tāriq ibn Zirad kaj poste de Mŭsa ibn Nusayr aŭ sia filo ‘Abd al-

Azziz, nur eksplikeblas pro la pacema sinteno de la arabaj trupoj, kiuj eĉ sin sciantaj kiel venkantoj, neniam sin montris kiel tiaj, kaj en neniu kazo humiligis la kristanajn loĝantojn. Apenaŭ ili kontaktis kun la loĝantaro de iu ajn urbo, oni proponis ĝin malavaran traktaton, en kiu oni respektis la tuton de siaj plej amataj tradicioj. La unua el tiuj pacotraktatoj, modelo akordita inter kristanoj kaj araboj, estis tiu subskribita en Auriola en la jaro 713-a fare de la kristana Gubernatoro de Auriola, Teodomiro, kaj la filo de Mŭsa, ‘Abd al-Azziz, en kiu oni garantiis pacon, liberan praktikadon de la propra religio kaj politikan aŭtonomion por la tuta regiono. Kompense, ĉiuj loĝantoj, nobeloj kaj kamparanoj, devis pagi ĉiujare difinitajn impostojn sub la formo de nutraĵoj. Agrabla surprizo por la venkitoj estis la fakto, ke la impostoj estis konsiderinde malpli altaj ol tiuj pagendaj al la antaŭa gota reĝimo.

La prestiĝa historiisto kaj antologiisto ‘Abd al-Dabbi detale priskribas tiun eventon okazintan en Auriola kaj kopias la menciitan traktaton. La novaĵo dissemiĝis tra la tuta Hispanio, kie ĝenerale oni akceptis ne batali sub la garantio de similaj traktatoj.

Post la vintro de la jaro 713-a, la armeoj de Tāriq kaj Mŭsa kunfanditaj en unu sola, jam definitive komanditaj de la generalestro de Nord-Afriko Ibn Nusayr, daŭrigis sian progresadon okupante post Alba de Tormes, Salamankon kaj aliajn malgrandajn urbojn aliajn pli gravajn, kiel Zaragozon, Lleidon, Barselonon kaj preter la Pireneoj, Narbonon, Avinjonon kaj

Lionon, ĝis Puatiero, kie, antaŭ la firma rezistado de frankoj, ili restis surloke dum pluraj jaroj, nur sporade batalantaj. Mūsa revis reveni en Damaskon tra Centra Eŭropo kaj Konstantinoplo, sed tiu projekto konsternis la kalifon Al-Walid (705-715), kiu, apenaŭ informita, kolere ordonis al la generalo Mūsa sin prezenti persone antaŭ li en la Damasko-kortego, ne nur ĉar la projekton li konsideris vera frenezaĵo tute ne plenumbla, sed ankaŭ —kaj pli grave— ĉar ne ordonita de li, la kalifo, li sin konsideris ofendita. Cetere, en la Damasko-kortego jam oni tro murmuris pri la milit-prestiĝo kaj riĉaĵoj akumulitaj de generalo Mūsa, kaj tio vekis la envion de la plej influhavaj korteganoj kontraŭ li.

Mūsa prokrastis sian revenon al Damasko kiel eble plej, sed fine li devis obei la kalifon, kaj en la jaro 714-a marŝis li fronte de karavano tra Nord-Afriko, Egipto, Palestino ĝis la kalifejo, lasante kiel ĉefkomandanto de Tanĝero al unu el siaj filoj, alia el ili ĉefo de la armeo de Ifriquiya kaj al sia plej amata filo, ‘Abd al-Azziz, kiel unua gubernatoro de Al-Andalus, kiu starigis la oficialan sidejon en Sevilo.

Tuj post la alveno en Damaskon de generalo Mūsa forpasis la kalifo al-Walid, tial li estis akceptata de la nova, Sulayman (715a-717a), ne kiel generalo triumfanta en cent bataloj, sed kiel homo nedigna de la gloro kiun li jam posedis, devigata pravigi sian konduton antaŭ li. Sed lia malfeliĉo ne finiĝis post tiu amara akcepto, ĉar apenaŭ unu jaron poste (716-a) lia filo ‘Abd al-Azziz estis perfide murdita, ŝajne pro ordono de la Damasko-kalifo mem.

La morto de ‘Abd al-Azziz senstabiligis la politikan situacion de Al-Andalus pro rivalecoj plej diversaj el pluraj minoritatoj, kiuj malfaciligis la disvolvon de ia ajn efika politiko de la sinsekvaj gubernatoroj (21 laŭlonge de 40 jaroj). Apenaŭ inter ili oni povas elstarigi la regadon de ‘Abd al-Rāhman ibn ‘Abd Allah al-Gāfiqī (730-732), kiu preskaŭ metis finon al tiuj tribaj luktoj antaŭ ol marŝi norden, preter la Prieneoj, fronte de militekspedicio konsistanta el okdek mil soldatoj por batali kontraŭ la trupoj de Karlo Martel. Ambaŭ armeoj batalis dum unu semajno inter Turo kaj Puatiero, en kiu mortis al-Gāfiqī. Konsternitaj post la perdo de sia generalestro kaj aliaj strategiaj problemoj, la arabaj trupoj revenis en Al-Andaluson kaj starigis firman landlimon inter la Pireneoj kaj Zaragozo.

Dum tiuj eventoj okazis en Al-Andalus, la centra registaro de Damasko travivis teruran nesubteneblan krizon pluraspektan, en kiu miksiĝis la milito nedecidita kontraŭ Bizancio, la ribeloj de Aziaj okupitaj teritorioj, kun la propra situacio ekonomika-socia, ja la popolo protestis kontraŭ la altaj impostoj, kiujn ili devis pagi. Tuj post la ribelo de Sirio, la kalifo Hišām (724a-743a) devis forlasi Damaskon kaj starigi sian sidejon en Rusāfa, urbo kiu situis en la dezerto, kie la omaja familio retrovis la kadron de ilia ancestra vivo, konsistanta el bankedoj, ĉasoj, poeziaj recitaloj kaj aliaj amuzoj. En la jaro 749-a konspiro politika-religia kaj sekva ribelo sukcesis, kaj en la jaro 750-a nova kalifo el la familio ‘Abbasia estis proklamata en Kūfo, kaj la lasta kalifo de la omaja dinastio, Mārwan la II-a, estis venkata

kaj mortigata apud rivero Grand Zâb, alfluanta en la riveron Tigrison.

La nova ‘Abbasida reĝimo deziranta certigi sian estonton kaj eviti eventualajn rivalojn de la omaja dinastio, ruze preparis bankedon kaj invitis al ĝi ĉiujn membrojn trompe indikante ilin *por definitiva paco inter niaj familioj*, sed dum la festo oni murdis ĉiujn omajajn invititojn, escepte de unu el ili ne partoprenanta en ĝi, la juna ‘Abd al-Râhman, kiu apenaŭ eksciis pri la terura masakro forkuris, unue al la dezerto serĉante rifuĝon ĉe fidelaj beduenoj, poste eksterlanden: al Palestino, Egiptio kaj Nord-Afriko, ĉiam sovaĝe persekutata de la novaj ‘abbasiaj landomastroj kaj timante ĉiu-momente perfidon kaj morton. Ne trovante sekurecon en iu ajn loko, en la jaro 754-a ‘Abd al-Râhman pensis kiel plej adekvata loko por definitiva restado pri Al-Andalus, kaj tiucele li sendis sian serviston Badr tie, por esplori kiajn eblecojn oni povus trovi en tiu lando: li kontaktis kun pluraj arabaj minoritato-ĉefoj, inter ili la jemenia, kiu entuziasme akceptis la ideon pri la estrado de la prestiĝa omajido, kaj sendis ŝipeton por translokiĝo de la princo al hispanaj teroj.

Kun alveno de Abd al-Râhman en Al-Andaluson, aliaj minoritatoj ankaŭ sin sumis al tiu entrepreno por konkordo de al-andalusanoj, pensante ke, eble, sub la gvidado de tiu princo oni povus trovi stabiligan pacon inter la diversaj minoritatoj. Kaj kiel okazis, apenaŭ alveninte la juna ‘Abd al-Râhman, multnombraj soldatoj enviciĝis en sia armeo kaj tiam komencis sian kampanjon kontraŭ tiuj grupoj ankoraŭ

malfavoraj al li, venkis ĉiujn ilin en Archidona, Sidonia kaj Sevilo en sia militrado al Kordovo, okupante ĝin en la jaro 756-a, kie li starigis la ĉefurbon de la emirio, poste venkis al la tiama gubernatoro Yusuf, en Alameda, kaj nur 26-jaraĝa, li sin proklamis unuan emiron de Al-Andalus. Sed tiuj ne estis liaj lastaj bataloj, ankoraŭ li devis venki plurajn ribeletojn en diversaj regionoj de la lando, dum preter la Pireneoj la reĝo Karolo la Granda, posedanto de granda imperio kaj en tre bonaj rilatoj kun la reĝimo ‘abbasia de Bagdado, pretendis konkeri Al-Andalus kaj tiucele en la jaro 778-a lia armeo atakis la al-andalusojn, konkeris Pamplonon kaj sieĝis Zaragozon, sed li ne sukcesis konkeri ĝin, kaj sub la premo de pluraj urĝaj problemoj, li kun siaj trupoj devis returni al sia lando, sed survoje sia armeo estis surprize atakata inter la navaraj montoj de Roncesvalo fare de kristanoj kaj muzulmanoj aliancitaj, kiuj okazigis al lia armeo terurajn perdojn, inter kiuj mortis prestiĝaj militistoj, la plej fama el ili estis la kavaliro Rolando, poste prikantata kiel heroo per la tiel nomata *Kanzono de Rolando*.

Post atingi tiel malfacile la pacon en la lando, ‘Abd al-Râhman, posedanta eksterordinaran lertecon politikan, sin dediĉis al la kreo kaj disvolvo de la multnombraj eblecoj agrokulturaj, artaj, soci-politikaj, kulturaj k.a. religeblaj en Al-Andalus. Li elektis inter siaj plej kapablaj kaj fidelaj homoj la unuajn gubernatorojn por la diversa al-andalusaj regionoj, starigis la unuajn irigaciajn sistemojn en la tuta lando, importis el mezoriento arbofruktojn kaj legomojn,

kiuj riĉigis precipe la sudan kaj orientan bedaron de la lando. Li strebis disvastigi inter siaj regatoj la kutimojn de la araba popolo: amo al la poezio, instigo al sciencostudo kaj muzulmanaj tradicioj, li mem verkis belajn poemojn kelkaj el ili reproduktitajn en mia verko **Lirikaj perloj el Al-Andalus**². Li plibeligis Kordovon per ĝardenoj, novaj konstruaĵoj kaj publikaj modernaj banejoj, ekkonstruis la grandan moskeon, modelo de aliaj konstruotaj en Al-Andalus, kaj ordonis ankaŭ konstrui por sia propra loĝado belegan palacon nomatan al-Ruzafa, ĉirkaŭata de ĝardenoj, mirindaĵo ja de tiu epoko.

*²Same kiel mi, ho palmo!
fremdas vi en Okcidento;
dista de ni, nia lando,
ĉa ne lasas mian menson!
Plori kun mi vi ne povas,
ĉar pro via mutnatura
vi ne sentas en la koro
la doloron kaj la ĝvon.
Se vi mian izol-fremdon
povus senti — bela palmo! —
vi komprenus kun klareco
la doloron kaj amaron
miajn kaj la dolĉan senton
pri elvoko de Bagdado!
Kaj vi devus verŝi larmojn,
sendi viajn tristajn plendojn
al la frataj verdaj palmoj
de la dista Oriento,
kiujn l'akvo de Eŭfrato
klara kiel pura gemo,
plej konstante akumadas;
sed forgesas vi la teron
kaj kun tio mi elvokas
la fatalan sortkruelon,
la patrion, kie Abbās
baras mian revencelon!* (el **Lirikaj perloj de Al-Andalus**, pp. 9-a/10-a).

En la jaro 76-a la sidejo de la kalifejo de Damasko translokiĝis al Bagdado kaj dekon da jaroj poste, Abd al-Rāhman, ĝis tiam teorie dependanta de la Bagdado-reĝimo, rompis ĉiun ligilon kun sia patrio kaj deklaris Al-Andalus kiel emirion tute sendependa.

Post tiu solena deklaro decidita de la emiro ĝuste kiam li estis konstatinta ke la Bagdado-kalifo komplotis por mortigi lin, jam ne plu ekzistis oficialaj rilatoj inter ambaŭ landoj, tamen intensa fluo de personoj kun intereso diversaj, kulturaj mesaĝoj kaj komercaj produktaĵoj venis el mezoriento tra Mediteraneo, antaŭ la konstato ne nur pri la riĉeco kaj prospero de Al-Andalus, sed ankaŭ pri la evidento, ke ĝi sendube baldaŭ montriĝos kiel unu el la plej gravaj potencoj de la apudmediteraneaj landoj.

En tiuj jaroj oni parolis en Hispanio plurajn lingvojn: la romancan, devenante el la latina en sia vulgariĝa periodo, parolata de hispanoj; la araban, kiel oficialan lingvon de la regantoj; berberan, dialekto nur parolata de soldatoj de Nord-Afriko, kaj la hebrean, uzata en la judaj kvartaloj de tiu minoritato. Baldaŭ la araba superis ĉiujn aliajn kaj ne nur ĉar ĝi estis la lingvo de la regantoj, sed precipe ĉar teorie kaj pragmate ĝi montriĝis kiel la plej kompleta kaj fleksebla de tiu epoko, kapabla esprimi de la fantazio de la plej imagopova menso al tiu objektiva de pragmata homo en ĝia ordinara uzo. Ĝi posedis riĉan trezoron konsistantan el alta nombro da uzeblaj vortoj, kaj krom tio ankaŭ la eblecon por derivi el unu vorto-radiko indikanta agon,

multnombrajn terminojn por aliaj esprimoj laŭ la kapablo kaj sentiveco de ĉiu homo, tiamaniere ke la multnombro da fonemoj ebligis al parolanto esprimi plej diversajn bildojn, ĉu por simpligo de la diroformoj, ĉu por beletra uzo inventante rafinitajn paragrafojn envolvitajn en belaj metaforoj, kio en la lirika kampo faciligis la trovon de la ĝusta vorto eĉ por nuanci ĝin de certa melodio kaj ritmo vere nekredablaj... Se al tiu ebleco oni aldonas la tradicion de la poezio el beduena origino, ni tuj komprenos kial la araba lingvo neniam havis seriozan rivalon en Iberio.

En tiu etoso la naskiĝo kaj malvolviĝo de la poezio en Al-Andalus estis rapida kaj ne nur ĉar de la unua momento la emiro akceptis en sia palaco salajrataj poetoj kaj kantistinoj, sed ankaŭ ĉar la plej prestiĝaj gramatikistoj konsilis al la pedagogoj lernigi poezion antaŭ ol ia ajn alia scio, ja ili opiniis, ke tiu apriora lernado plifaciligis la komprenon de la ceteraj lernofakoj. La amo de la hispanoj al la poezio, inkluzive de tiuj, kiuj restis fidelaj al la kristana doktrino, estis tiel fervora, ke la fama intelektulo de tiu epoko, la monaĥo Álvaro de Kordovo, plendis ke *siaj samideanoj tute malzorgis la latinan lingvon, entuziasme legis poemojn kaj rakontojn en la araba, kaj eĉ verkis en tiu lingvo versojn pli korekte kaj elegante ol la araboj mem...*

La poezio kuŝis, do, en la koro mem de la tuta scio kaj kulturo kiu ekfloris dum tiuj jaroj ĉe la sudo de Eŭropo, en Al-Andalus, kaj tiu estis sufiĉa allogo por altiri la venon de intelektuloj plej diversaj: scientistoj, poetoj kaj aliaj

prestiĝaj studemuloj el mezoriento, kiuj aspiris ankaŭ al la oficiala protekto ĝuebla en Al-Andalus, kie kunvivis en harmonio diversaj rasoj kun ties koncernaj religioj, lingvoj kaj kutimoj, etoso ne facile trovebla en aliaj landoj.

Jen kiel ekfunkciis Al-Andalus kiel ponto inter kulturoj!



En la jaro 788-a forpasis la unua emiro de Al-Andalus, Abd al-Rāhman la I-a, kiu lasis post si gravajn atingojn por al-andaluso. La sekvantaj emiroj, Hiŝam la I-a (789a-796a) kaj al-Hakam la I-a (796-822) daŭrigis la taskon komencitan de la unua omajo, sed post tiuj emiroj, regis la emirion Abd al-Rāhman la II-an (822-852), jam 30-jaraĝa, imagokapabla kiel poeto, kun grava militista sperto kaj granda talento kiel administranto. Li organizis la registaron kreante la figuron de la veziroj, laŭ modelo 'abbasia, kiuj helpis lin pri ĉiuj rego-taskoj, kaj tio enorme influis en la progresado de la lando en ĉiuj aspektoj: li ampleksigis la Kordovan moskeon, konstruis aliajn en Sevilo, Ĥaeno, k.a. urboj kaj krom belaj palacoj, li ankaŭ ordonis konstrui la unuan basenegon de Al-Andalus. Dum lia re-

gado, la poezio de Al-Andalus pasis de la periodo de sia formiĝo, laŭ modelo de mezorientaj poetoj, al tiu reprezenta de la propra socio. La emiro sendis al Mezopotamio spertajn fakulojn por kopii la plej gravajn prisciencajn verkojn originale verkitaj de grekoj kaj persoj, ja li mem studis antikvajn tekstojn pri filozofio kaj medicino, kaj fondis kaj starigis la sidejon por altaj kaj prisciencaj studoj en sia propra palaco, kaj alian por lernigi muzikon en kiu formiĝis la popularaj kantistinoj Fadal, Adam kaj Qalan.

Sed la famo de tiuj brilaj steloj de la kanto paliĝis je la alveno de Ziryāb, kromnomita *la nigra birdo*. Lia prestiĝo estis tiel granda kaj lia influo en la tiama al-andalusa socio tiel grava, ke mi devas iom paroli pri li: Naskiĝinta en Bagdado en la jaro 789-a, li devenis el persa familio kaj lernis muzikon kaj kanton en la lernejo de la Bagdado-kortego kiun gvidis Iŝāq al-Mawsili. Tiamaj kronikoj rakontas, ke iun tagon, la kalifo Harūn al-Rāšid (766a-809a) demandis al la menciita majstro ĉu iu ajn el liaj lernantoj speciale elstaris super la aliaj. La majstro, responde, prezentis al li sian lernanton Ziryāb. Nur unu fojon tiu ĉi kantis antaŭ la kalifo, kaj li tion faris tiel majstre, ke la kalifa moŝto vere entuziasmiĝis. La tiamaj kronikoj de Al-Maqqari rakontas, ke kiam Ziryāb sin prezentis antaŭ Harūn al-Rāšid oni donis al li la liuton de la majstro, sed li ne akceptis ĝin, kaj firme diris al la kalifo:

- *Sinjoro, se vi volas, ke mi ludu kaj kantu laŭ la karakterizoj de mia majstro, mi uzos ĉi tiun liuton, sed se vi volas aŭdi min ludi laŭ mia*

propraj stilo kaj scio, mi uzos specialan liuton, inventitan de mi mem. Kaj tiel akompanante sin per sia delikata instrumento, li kantis kanzonon³ honore al la kalifo.

Tiu ricevis tiel profundan impreson, ke li esprimis sian deziron reaŭdi la junan lernanton, sed tio ne plu eblis, ĉar, ĵaluza, lia majstro al-Mawsili postulis de Ziryāb rapidan definitivan decidon: aŭ li konsentis forlasi la landon akceptante grandan monsumon, aŭ li ordonos mortigi lin. Ziryāb decidis vojaĝi al la malproksima Al-Andalus, kie invitita de la emiro li povos sendube elmontri sian eksterordinaran talenton.

Mi ne menciis tiujn biografiajn detaletojn por ornamo de mia prelego, sed por informi vin pri unu el la idoloj de Kordovo en tiu epoko, kiu grave sciis influi en la tiama socio: li lernigis kantarton kaj muzikon en la Konservatorio starigita en la emiro-palaco; li montriĝis kiel mirinda organizanto de la tiama intelekta mondo en la al-andalusa ĉefurbo, kaj estis aŭtenta erudiciulo pri geografio, astronomio, historio, gramatiko, muziko, poezio; kaj la tiamaj kronikistoj emas insisti, ke estas vera ĝuo aŭdi lin paroli pri landoj, moroj, gravaj intelektuloj kaj klasikaj verkistoj el oriento. Laŭ sugestoj de Ziryāb, la kordovaj korteganoj lernis vesti laŭmode per la vestokoloroj adekvataj al ĉiu sezono, kombi sin aranĝante la harojn en franĝeto sur la frunto, manĝi fajnstile, aŭ konversacii pri intelektaj temoj.

³Li verkis 10 000 kantojn dum sia tuta vivo.


La forpasoj de Abd al-Rāhman la II-a en la jaro 852-a, kies regado vekis la admiron kaj respekton eĉ de sia rivalo en Mediteraneo, Bizancio, kaj tiu de Ziryāb en la jaro 857-a, instiganto kaj organizanto senlaca de sciencostudoj kaj artoj, signifis en la sekvantaj jaroj gravan altan nivelon, sed dum longa periodo stagnis la progresado de arto kaj scio en Al-Andalus.

La novaj emiroj, Muhammad la I-a ĝis la jaro 886-a, lia filo Al-Mundir reganta apenaŭ du jarojn kaj Abd Allāh ĝis la jaro 912-a, ne atingis bremsi la ambicion de certaj minoritatoj kaj la unuiĝo de Al-Andalus grave eroziigis. Rivalecon inter fratroj por heredo de la emirposteno komplikis ankoraŭ pli la situacion, kiu finiĝis post la morto de ambaŭ fratroj kaj elekto de la nepo Abd Allā, Abd al-Rāhman la III-a, kies talento jam aŭguris de la unua momento brilan regadon.

La nova emiro, nur 21-jaraĝa, edukiĝis sub la atenta zorgo de sia avo Abd Allāh. Kiam ankoraŭ li estis tre juna, li jam ricevis respondecajn taskojn, kies kontentigaj solvoj baldaŭ lasis diveni siajn prudenton kaj kuraĝon, kiuj sin tradukis en utila sperto. Simile kiel la unua omajo, li komencis per la pacigado kaj unuiĝo de la lando: bremsis la agresemon de la kristanoj ĉe la nordo kaj la afrikanoj ĉe la sudo, kaj kiam la paco ĝeneraliĝis, li metis ordon en la agrokulturon, industrion kaj komercon. La ĝeneraligo de irigaciaj sistemoj per norioj kaj kanaletoj faris fruktodonajn eĉ la plej aridajn grundojn, dum la komerco tiel pozitive evoluis, ke laŭ la tiam ĉefo de la ŝtata dogano, la plej

granda parto el la ŝtato-enspezoj venis ne de la impostoĵoj, sed de la abunda eksportado de produktajtoj. Tiu ekonomia prospero ebligis la konstruon de impona belega urbo je kelkaj kilometroj de Kordovo, la mirinda Madinat al-Zahra: laboradis en tiu konstruo 10 000 laboristoj kaj 1 500 ŝarĝbestoj dum 25 jaroj, malfeliĉe ĝi estis detruita de barbaraj integristaj afrikanoj kelkaj jardekoj post la forpaso de tiu ĉi emiro, kiu sin proklamis unuan kalifon de okcidento.

Efektive, en la jaro 929-a Abd al-Rāhman la III-a, jam unua kalifo de Al-Andalus, atingis por sia lando la ĝeneralan rekonon kiel unuavica potenco de Mediteraneo. Kordovo, kun 500 000 loĝantoj, 113 000 domoj kaj 3 000 moskeoj, nur kompareblis al impona Bagdado. Paralele kun tiu prospero, progresis ankaŭ poezio, sciencoj, juro kaj literaturo. Oni fondis en Kordovo la unuan medicino-lernejon de Eŭropo, kaj al ĉefurbo venis reĝoj kun multnombraj diplomataj delegacioj, kiuj estis agrable surprizitaj de la brilo en ĉiuj aspektoj de la kordova kortego. Naskiĝis dum tiuj jaroj la profana hebrea poezio. Tute nova mondo intelekta fermentis en la tuta Al-Andalus. La naskiĝo de novaj scioj estis tiel grava, ke la tiamaj atlernejoj restis nesufiĉaj por plenumi sian docentan taskon, kaj la sep plej gravaj studaĵoj: gramatiko, retoriko, religio, matematiko, poezio, geometrio kaj astronomio, ne havis la sufiĉan amplekson por adekvata pritrakto de aldonaj scioj kaj teknologioj. Tiam la plej grava el la religiaj lernejoj de ĉiu urbo, normale funkcia apud la ĉefmoskeo, nomataj



Madraso

madrasoj, devis sin okupi pri pli altaj studoj, simile kiel ĉe ni funkcias nun la universitato, do kvankam Eŭropo sin atribuas la kreigon de tiuj altinstruaj institucioj por la formiĝo de docentoj kaj sciencesplorado, vero estas, ke la latina *universitas* kiel institucio estis kreitaj laŭ modelo de tiuj *madrasoj* de Al-Andalus, kiuj kopiis tiujn de Sirio, Palestino kaj Persio, kaj la ankoraŭ pliantikvaj de Aleksandrio kaj Kairo. Estis tiel, kiel la madraso de Kordovo atingis tutmondan famon kaj al ĝi venis ĉiu scivolulo, kiu interesiĝis pri novaj scioj.

Iam mi esperas komenti al vi per monografia studaĵo, eble en alia prelego, la version araban kaj de aliaj elstaraj fakuloj pri la eniro en Eŭropon de la al-andalusaj filozofio kaj sciencoj. Fari tion hodiaŭ tro plilongigus ĉi tiun prelegon, tamen permesu al mi skizi la precipajn elementojn, kiuj alportis al-Andalus al

eŭropanoj, kaj sekve tiun kvazaŭ rajton por elmontri ilin al la mondo: konsentite, do, pri la radikoj de la plej gravaj elementoj konstituantaj la eŭropismon, kies originoj nekontesteble venis el la grekaj kaj romiaj civilizacioj kaj la kristanismo, sed per kio kontribuis Al-Andalus al la esenca formiĝo de Eŭropo?

Se si atente studas la tiuepokajn verkojn ni baldaŭ konstatas, ke ekzistas gravaj diferecoj inter la grekaj scienco kaj filozofio

laŭ ili estis origine verkitaj kaj tiuj samaj temoj interpretitaj de al-andalusoj, kiuj siaflanke ricevis rektan influon el Bagdado kaj aliaj mezorientaj kulturoj tra la mediteranea interkomunikado: la aristotelaj teorioj en tiuj kampo ŝajnis perfektaj kaj netuŝeblaj, nur validaj por debatoj aŭ kontemplado. Sed la greka scienco en manoj de araboj transformiĝis en io alia pli pragmata, kaj en tiu linio ni observas, ke la medicino en Al-Andalus transiras al la ĥirurgio kaj esplorado pri kuraciloj; la ĥemio transformiĝas en alĥemio; aperas kaj oni ekuzas la modernajn ciferojn; matematiko postulas kaj provas novajn instrumentojn por kalkulado kaj observado; astronomio, krom scienco estas ankaŭ astrologio; oni donas nomojn al la steloj, kaj sur tiu vojo vera karuselo de teknologioj kaj utilaj instrumentoj invadas la ĉiutagan vivon de la homo: la instalado de norioj kaj kanaloj sekigas marĉogrundojn kiuj

transformiĝas en riĉaj bedaroj; la ventmueliloj revoluciigas la sistemon pri muelado de grenoj; la papero ekfabrikita de ĉinoj en la 757-a venas tra Bagdado kaj en la urbo Xativo oni starigas la unuan paperfabrikon de Al-Andalus kaj de Eŭropo je la komenco de la 11-a jarcento. Kaj tiuj progresoj eniras ankaŭ en diversajn aspektojn de la higieno de la individuoj, ekzemple, la arabaj publikaj banejoj estis kutime dotitaj de varma akvo kaj aliaj elementoj por knedado de muskoloj kaj artikoloj por kuracaj celoj, krom esti ankaŭ agrabla loko por konversacioj. Mi ne volas lacigi vin per indiko de multaj aliaj pragmataj transformiĝoj devenantaj el grekaj kaj romiaj teorioj, kaj nun normale uzataj de eŭropanoj post la al-andalusa aplikado.

Paralele al tio, formiĝis en Al-Andalus vera plejado de filozofoj, matematikistoj, poetoj, astronomoj, gramatikistoj, kuracistoj, historiistoj, geografoj kaj tiel plu, kies alta nivelo superis al tiuj plej elstaraj de okcidento kaj devigis al ĉiu eŭropa klerulo deziranta progresi pri scienco kaj aliaj scioj, pilgrimi al Kordovo. La nomoj de la kordovano Averoeso, enciklopedia filozofo, kies komentoj pri Aristotelo celis akordigi en sia verko **Rilatoj inter scienco kaj religio** racion kun fido; la zaragozano Avempaco, filozofo, muzikisto kaj poeto, aŭtoro de la verko **La reĝimo de la solulo**, kies penso nov-platona tiom influis en la mezepoko; la mursjano ibn Arabi, aŭtoro de la verko **Ribelo pri Meko**, la plej grava mistikulo de sia epoko, kiu enorme influis per siaj mistikaj teorioj en la muzulmanan

genton kaj poste ankaŭ en la kristanoj; la kordovano Ibn Hazm, filozofo kaj poeto, aŭtoro de la renoma verko **La Kolomb-koliero**, la plej grava verko ĝis la XIX-a jarcento pri amo; la juda malagano Ben Gabirol, filozofo kaj poeto, kies pribiblia ĉefverko **Reĝa Krono** kaj alia prifilozofia **Vivofonto** estis tradukitaj al la latina kaj tre disvastigita inter skolastikanoj; la juda kordovano Majmonido, astronomo, eble la plej grava kuracisto en la mezepoko, aŭtoro de la verko pri problemoj inter racio kaj fido **Gvidlibro por dubemuloj**, kaj kun ili intelektuloj tiel eminentaj kiel Ibn Tufayl, Ibn Masarra, Al-Zubaydi, Al-Qutiyya, Al-Mutamin, Ibn Sabin, Ibn Nagrella, ibn 'Ezra, Al-Gazal, Abu Bakr de rondo, al-Mutamid, kaj longa vico de multaj aliaj, kies sola mencio eksplikas multe pli elokvente ol mi povus tion diri en multaj paĝoj...

Ni diru kiel konkludo, ke la ordinara homo de la tiama Al-Andalus faris grandegan salton antaŭen, ŝanĝiĝis ja la homo-modelo. Hispanoj, araboj kaj hebreoj en admirinda simbiozo estis en la kerno de tiu nova homo. Tre ofte oni forgesas en Okcidento, kiel prave asertas la hispana filozofo Ortega, ke antaŭe al la naskiĝo de Mahometo, la araboj vivis dum sep jarcentoj ĉirkaŭataj de popoloj helenigitaj, kiuj grave influis en ilia pensado., Tiu valorega akumulo da scioj saltis tra Mediteraneo kaj trovis en al-andalusoj la elementojn necesajn por la formiĝo de la menciita nova homo.

Ne malfrue, tiu valorega trezoro de scienco kaj scio eniras en Eŭropon iom post iom, unue tra la ambasadoroj kaj sciencistoj kiuj vizitas Kordovon; tra la

tradukoj de verkoj fare speciale de judoj, kiuj perfekte regis la araban lingvon kaj post akiri kompetentecon ili ofte vizitis Eŭropon sin dediĉantaj al instruado inter doktaj kristanoj scivolaj pri novaj sciencoj; meritoplena estas tiusence la tasko farita de scienco-resumoj de skipo da tradukantoj de Alfonso la X-a kaj Raimundo Martín (1230a-1286a), kies sciojn pri arabaj aŭtoroj, eble, neniu superis ĝis nun en Eŭropo; la lernejo de tradukistoj de Toledo, la monaĥejo de Ripoll; Raimon Llull (1235a-1315a), fervora batalanto kontraŭ la filozofio de Averoes sed elstara en la traduka tasko, ne vane li fondis lernejon de tradukistoj; kaj kun la cititaj ni povus aldoni ankoraŭ longan liston de homoj kaj lernejoj, precipe en la kristana Hispanio, kiuj provizis al Eŭropo de verkoj por aktualigo de ĝia scienconivelo, ĝis la punkto, ke laŭ transkribo de Levi Provençal en sia verko **Sevilo komence de la XII-a jarcento**, Ibd Abdun de Sevilo protestis antaŭ tajforeĝo *pro la vendo al judoj kaj kristanoj de sciencolibroj, kiujn ili poste tradukis kaj prezentis kiel siaj propraj aŭ de siaj episkopoj*.

Kaj al tiu febro de tradukoj kies sola celo estis aktualigi la kampon de la scio en la tuta Eŭropo, dronita en terura krizo de sciencaj, filozofiaj kaj etikaj valoroj, Alberto Magno klarigis en la jaro 1245a la sintenon de la tiamaj intelektuloj: *nia intenco —li diras— estas komprenebligi en la latina ĉion verkitan en la araba, precipe pri fiziko, metafiziko kaj matematiko*. Sed li ne volis mencii la filozofion, ĉar en tiuj momentoj la Averoesaj teorioj, malgraŭ ĉiuj

kondamnoj kaj kontraŭstaroj, eniris nebremseble en la aŭloj de Parizo kaj aliaj eŭropaj universitatoj.

Senkulpigu min, samideanoj kaj amikoj, se mi iom devoĵigis mian temon historian kaj invadis alian, kiu certe fascinas min, tiu pri la originoj de Eŭropo kaj eŭropismo.

Ni daŭrigu nian priskribon indikante ke Abd al-Rāhman la III-a regis Al-Andalus dum 50 jaroj. Li forpasis en la jaro 961-a kaj ni aldonu, ke lia regado baziĝis precipe sur ekonomiaj parametroj, kaj kun sia saĝo li uzis en decidaj momentoj firmecon kaj prudenton.

Dua kalifo de Kordovo estis lia filo Al-Hakam la II-a, bona administranto kaj inteligenta homo, kies regado donis longan pacan periodon al la lando. Homo pasie amanta la kulturon, li serĉis kun sama fervoro antikvajn kaj novajn librojn. En Kairio, Bagdado, Damasko kaj Aleksandrio li havis inteligentajn agentojn komisiitajn kopii aŭ aĉeti interesajn librojn. Lia palaco estis plenplena ne nur de libroj, sed ankaŭ de filologoj, kopiistoj, bindistoj kaj miniaturistoj. Kelkaj fakuloj kalkulis, ke la nombro da libroj en lia biblioteko superis 400 000 volumojn, nur superita de tio de Bagdado (1 000 000 da volumoj) kaj Kairo (1 600 000 volumoj). La diferenco kun Eŭropo estis enorma, kiel ekzemplo ni diru, ke Karolo la V-a (1337a-1380a), reĝo de Francio, posedis gravan bibliotekon preskaŭ kvar jarcentoj poste, sed ĝi ne superis 900 volumojn. Al-Hakam ne nur legis ĉiun libron, sed kutime notis sur ĉiu el ili tiujn

detalojn, kiujn li konsideris interesaj. Komentoj lian regadon sub vidpunkto de la kulturo estus vere interesa, sed tio postulus tro da tempo. Ni nur aldonu, ke li ne nur protektis sciencistojn kaj poetojn, sed ankaŭ atentis la kulturon de malriĉuloj: li ordonis konstrui en la ĉefurbo tridekon plian da publikaj lernejoj, en kiuj erudiciuloj malavare pagitaj de la kalifo instruis al malriĉaj infanoj kaj orfoj.



Li forpasis en la jaro 976-a, kaj okupis sian postenon kiel nova kalifo lia filo, Hixām la II-a, apenaŭ 11-jaraĝa, sendube tro juna por la regotaskoj, do dum li restis kiel ornama figuro preskaŭ en kaptiteco regis la landon lianome kiel veziro Ibn Abi ‘Amir, pli konata per la nomo Al-Mansur, kiu firmege garantiis la internajn prosperon kaj kulturajn atingojn, kaj ekstere la prestiĝon de Al-Andalus. Kiel ĉefo de la armeo, konsistanta plej grandparte de analfabetaj nord-afrikanoj, oni kalkulas ke li entreprenis ne malpli ol 50 ekspedicioj kontraŭ la kristanaj trupoj. Li venkis en ĉiuj. En la jaro 997-a, la kristanoj el tuta Eŭropo konsterniĝis, kiam liaj trupoj konkeris Santiagon de Kompostelo, kie kutime ili pilgrimis, kaj kiel speciala puno kaj koncerna disvastigo de lia potenco, li translokiĝis sur la ŝultroj de militkaptitoj la sonorilojn de la templo plej amata de la okcidenta kristanaro ĝis Kordovo mem. La ofendo estis pli granda ol la brilo de la triumfo.

La ĉiopova Al-Mansur forpasis en la jaro 1002-a kaj siaj filoj volis okupi la plej altan regopostenon de Al-Andalus, sed mankis al ili la talento kaj genio de

la patro, kaj tial ili malsukcesis. Tiu malkapablo de la plej proksimaj al la povo favorigis la aspirojn al la trono de pluraj omajidoj unue, kaj poste aliaj figuroj de la politiko aŭ la armeo, sed la sinsekvaj fiaskoj de la sporadaj kalifoj por stabiligi la situacion kreis teruran konfuzon en la popolo, kiu, senlabora, malsata kaj laca de la promesoj neplenumitaj de nekapablaj politikistoj, protestis furioze tra la kordovaj stratoj ĝis ĝeneraligi ĝin en aŭtenta intercivitana milito kiam en la jaro 1031a koincidis tiu protestoj kun diversaj milit-ribejoj, kio fakte signifis la finon de la kalifoperiodo kaj de la omaja dinastio.

En tiu cirkonstanco la gubernatoroj kaj militestroj plej elstaraj, sub preteksto garanti iliajn repektivajn teritoriojn, sin deklaris sendependaj de la ne plu ekzistanta kordova povo, kaj Al-Andalus transformiĝis en lando konsistanta el multnombraj ŝtatoj regataj de reĝetoj, tio estas, tajforego. Jam io ajn en Al-

Andalus ne plu estis kiel antaŭe. Ĝi ne plu brilis kiel potenco kune kun bizancio kiel mastroj de Mediteraneo. Kurioze tamen, ke tiu nova situacio ne signifis malaltigon de la kultura kaj priscienca nivelo en la lando. Tute kontraŭe, la intelektuloj serĉis la protekton en unu el tiuj ĉefurboj kiuj rivalis inter si por superi la alian en scienco, poezio aŭ aliaj scioj, kaj tiuj gravaj intelektuloj, kiam troviĝis dorlote protektitaj, ekmalvolvis sian propran pensokapablon pli libere kaj sukcese ol antaŭe.

La tajforegnoj batalis unu kontraŭ la alia por atingi la hegemonion inter la muzulmanoj, kaj ofte ili eĉ ne dubis pagi altajn tributojn al la nordaj kristanaj reĝoj tiucele, aŭ cedis antaŭ certaj postuloj de la nord-afrikanoj. La plej potenca el tiuj ŝtatoj estis la tajforegno de Sevilo, regata de la familio Banu 'Abbād, kiu heredis de sia patro grandan fortunon kaj gravan politikan influon. Kiam malaperis la omajoj kaj kun ili la Kordova kalifujo, la sevilanoj, antaŭ la konfuzo kaj malordo regantaj en la tuta Al-Andalus, petis unuanime ke li regu la ŝtaton ne plu kiel gubernatoro sed kiel reĝo, kion li faris dum preskaŭ du jardekoj, sed lia ekspansia politiko kontraŭ la najbaraj regnoj ne sukcesis. Kiam li forpasis en la jaro 1042-a, okupis la tronon sia filo al-Mut'adid, kies politiko miksis ruzon kaj kruelon. Li estis bona poeto kaj sufiĉe bona administranto kaj fondis en Sevilo la *domon de la poetoj*, kie okazis ĉiusemajne poeziaj recitaloj. Li estis pli timata ol amata, ne nur de la popolo, sed eĉ de siaj propraj filoj, kaj elektis inter ili kiel heredonto de la regno sian filon

al-Mu'tamid. Por ke la estonta reĝo akiru sperton lia patro nomis lin unue bubernatoro de gravaj okcidentaj urboj, kaj poste ĉefon de la armeo, sed ĉiam sub lia atenta rigardo kaj fera disciplino.

Post la forpaso de sia patro en la jaro 1068-a regis la sevilan regnon al-Mu'tamid, unu el la figuroj plej elstaraj kaj dramaj el sia epoko: grava priama poeto, bona administranto kaj brava batalanto kiam li devis tion fari. Li malvolvis ekspansian politikon, kies rezulton estis la konkero de Kordovo, Ĥaeno kaj Mursio por lia regno. Kiel poeto li brile prikantis la amon kaj nolstalgion, la ĝojon kaj la suferadon. Lian poezion oni povas dividi po du partoj: tiu kiun li verkis dum sia juneco kaj prospera periodo de sia regado, kiam li vivis inter laŭdoj kaj plezuroj, kaj tiu alia verkita dum lia ekzilo inter suferoj kaj humiligoj. Lia poezio reprezentas la neoklasikan stilon de la tiama liriko, sed donante al ĝi certajn modernismajn nuancojn. Rakontas al-andalusaj historiistoj, ke al-Mu'tamid estis la plej gastema malavara kaj ĝentila el ĉiuj al-andalusaj princoj. Ĉe liaj palacoj trovis protekton kleraj pilgrimantoj, poetoj kaj ĉiaj intelektuloj, en kies salonoj ili ĝuis la ĉarmon de belaj horoj, en kiuj resonis la liutoj kaj oni sentis la plezuron aŭskulti la plej brilajn kantistinojn kaj poeziajn recitalojn de tiu tempo. Sed la destino elektis lin, same por ĝui grandajn ĝojojn kiel por sufero de teruraj dramoj. Li suferis la profundan doloron pro la morto de siaj filoj en la batalkampo aŭ en perfidaj okazaĵoj. Inter siaj intimaj ĝojoj estis tiu pri la kunvivado kun sia

edzino, amanta kiel li mem la poezion kaj inspirplena poetino. Pri amikeco, ni diru, ke dum multaj jaroj li estis lojala amiko de granda tiuepoka poeto, Ibn Ammār, sen kiu, laŭ li mem konfesis, li ne povis vivi. Iun tagon li dolore sciis, ke sia amiko perfidis lin kiel reĝon kaj kiel amikon, kaj kiam triafoje Ibn Ammār konfesis al li tiujn perfidojn malgraŭ liajn unuajn pardonojn, li, grave vundita en sia memestimo, mortigis propramane la amatan amikon.

La konkero de Toledo fare de la kristana reĝo de Kastilo kaj Leono, Alfonso la VI-a, en la jaro 1085-a, metis en danĝeron la tutan sudon de Al-Andalus, ja tiu reĝo ne plu akceptis tributojn sed proklamis ke lia celo estis konkeri Sevilon. Antaŭ tiu danĝero ĉiuj islamaj tajforeĝoj decidis, unue repaciĝi inter si, kaj due, ĉar ĉiuj ili kune ne sufiĉis por kontraŭstari la potencon de la menciita kristana reĝo, peti helpo al la maroko-imperiestro Yusuf ibn Taŝufin (m. 1107-a). Tiu princo de la almorabida gento, veninta el la dezerto kaj antaŭ ol tuaregoj, regis preskaŭ la tutan Magrebon.

Yusuf akceptis la peton kaj baldaŭ pretigis pli ol 7 000 ĉevalojn kaj multnombrajn berberajn tribojn, kaj kun tiu forta armeo elŝipiĝis en Alĝeziro en la jaro 1086. La nord-afrikaj trupoj kun tiuj de Al-Andalus kuniris norden. Sialflanke, la kristanoj komanditaj de Alfonso la VI-a, ankaŭ pretigis fortan

armeon kaj serĉis la malamikon. Ambaŭ armeoj trovis unu la alian sur kristana teritorio tre proksima al Badajoz. La batalo estis terura kaj post longega batalado kaj malcerta findecido, la kristanoj estis venkitaj kaj la reĝo Alfonso devis forkuri por savi sian vivon. La novaĵo de tiu brila venko en la batalo nomata al-Zallaqa, disvastiĝis tra la tuta Al-Andalus kaj Nord-Afriko, ja la



eltranĉitaj kapoj de la venkitoj estis malkabre alportataj por miloj al ĉiuj plej gravaj urboj.

Yusuf reiris al Magrebo kaj al-Mu'tamid al Sevilo, sed unu

jaron poste Yusuf revenis en Al-Andalus montrante jam tute senkaŝe siajn verajn intencojn: konkeri la tutan Al-Andaluson. Unue li venkis la reĝon de Granado kaj konkeris ties regnon. Tre malbone impresis en Sevilo la detruon de belaj palacoj en Granado fare de la sovaĝaj almorabidoj, sed ŝajnis ke Yusuf intencis respekti la regnon de al-Mu'tamid. La vero estis tute alia. Fine en la jaro 1090-a Yusuf demetis definitive sian maskon kaj kun la aprobo de imamoj kaj religiaj fanatikuloj atakis la sevilan regnon. Unu post alia, urboj kaj fortresoj de la sevilanoj estis konkerataj de almorabidoj, fine en la jaro 1091-a la nord-afrikaj soldatoj eniris en Sevilon. La loĝantoj kuris senespere kaj angore tra la stratoj, kaj multaj el ili forkuris el la urbo. Al-Mu'tamid, brave batalinte kaj sopiranta morti kiam la batalo sin montris malfavora

al li, estis kaptata kaj ŝargata per ĉenoj translokigata per ŝipo al Afriko kun sia familio. Li restis dumvive kondamnita en prizono de la urbo Agmat, ĉe la montaro Atlaso sudokcidente de Maroko. La eminenta historiisto kaj fakulo pri tiu epoko, Dozy, skribis pri tiuj vivojaroj de la sevila reĝo: *la sentivaj kaj emociigaj elegioj de al-Mu'tamid, tiel profunde impresas, ke la legantaro sentas ene de si similan amaran doloron ol tiu iam sentita de la reĝo-poeto, kiam li vidis sian familion kaj sin mem suferantaj tian duran punon.*

De tiu jaro ĝis 1145-a Al-Andalus estis kvazaŭ almorabida provinco, regata ekde Maroko per gubernatoroj en ĉiu tajforegno, kio donis certan unuecon al la lando krom restarigi la limojn ĉe la kristanaj teritorioj, sed tio ŝanĝe de la perdo de grandparte de la al-andalusaj kulturaj idealoj.

Yusuf, la almorabida imperiestro, ne bone komprenis la araban lingvon kaj al-andalusa kronikisto rakontas kuriozan anekdoton, kiu klare montras la malkleran profilon de tiu homo: post la batalo de al-Zallaqa, al-Mu'tamid skribis al la afrika princo leteron aplikante al li belan verson de Ibn Zaydun: *la blankaj noktoj pro la amo, kaj la nigraj tagoj pro foresto.*

Yusuf interpretis, ke oni petis al li sklavinoj blankaj kaj nigraj. Kaj kiam la tradukisto eksplikis al li la veran signifon, li diris: *Dio mia, kiel tio belas! Respondu lin, ke sur li kuras niaj larmoj kaj nia kapo doloras pro lia foresto.*

Malgraŭ ĉio, la poezia spirito de Al-Andalus ne mortis en tiuj duraj tagoj,

tute simple adaptiĝis al tiuj malfacilaj cirkonstancoj daŭrantaj iom pli ol duonjarcento. Efektive, la almorabidoj estis anstataŭitaj en la menciita jaro de almoadoj, berbera gento predikanta rigorajn doktrinojn kontraŭ-malahaĵajn, kiuj akuzis la ceterajn muzulmanojn kiel politeistojn. Ili konkeris, unue Nord-Afrikan kaj poste Al-Andalus. Sed tiuj eventoj ankoraŭ ne signifis la finon de Al-Andalus kiel fokuso de kulturo, ja la almoadoj, siaflanke, ankaŭ devis adaptiĝi al la al-andalusaj karakterizoj, vane ili regis la landon pli ol unu jarcento, sed nepre ankaŭ devis ricevi, siaflanke, la influon de tiu brila civilizacio.

Sed tiuj estis ja la horoj de la maturiĝo: en Al-Andalus aperis la unuaj antologioj, la *Dajira* de ibn Bassan; la *Orkolieroj*, de Ibn Jaqan; *Historio pri la gento de Al-Andalus*, de al-Dabbi kaj multaj aliaj. Multnombraj manuskriptoj restas ankoraŭ kvazaŭ perditaj aŭ ne tradukitaj en la antikvaj arkivoj, kiel tiu de al-Mutamin de Zaragozo enhavanta 400 teoremojn pri alta matematiko hazarde trovita en 1993 de nederlanda profesoro. Restas ankoraŭ preskaŭ nekonataj aŭ ne ĝuste taksataj, filozofoj, sciencistoj kaj poetoj tiel elstaraj kiel: Ibn Ruŝd (Averoeso 1125a-1198a), Ibn Tufayl (1110a-1185a), Ibn Bāyyā (Avenpace 1085a-1138a), Majmonido (1135a-1204a), Ibn Arabi, Avenzoar, al Mutamin ibn Hud, ibn Sabin, ibn Hazm kaj multaj aliaj. La potenco de tiu kulturo transsaltis limojn kaj disvastiĝis tra Mediteraneo al mezoriento kaj precipe al Eŭropo...

Mi povas certigi al vi, karaj kolegoj kaj amikoj, ke paroli pri la kulturo de ĉiu el la regnoj de tiu dividita Al-Andalus ankaŭ

povas esti vera plezuro: la skolo de poetoj nomata la *ĝardenistoj* de Valensjo, la grandaj filozofoj, elstaraj matematikistoj kaj erudiciaj reĝoj el Zaragozo, la mistikismo de ibn Arabi kaj la erudicia leksikografo ibn Sida de Mursjo, kaj ĝenerale ĉiu el tiuj tajforegnoj havis specialan allogon studindan kaj rakontindan, sed tiuj interesaj aspektoj pri la historio de Al-Andalus povus plenigi horojn kaj horojn, aŭ se skribitaj, paĝoj kaj paĝoj, kaj mi timas ke la cito de tiom da datoj kaj eventoj, eble, povas lacigi al tiuj, kiuj ne multe plaĉas la historio...

La epilogo de mia prelego koincidas kun la fino de la al-andalusa civilizacio: Granada. Kaj ĉar ĝi ne povas esti alimaniere, ni indiku, ke en la ankoraŭ ekzistantaj palacoj de la granada Alhambro, lasta hispana-araba tajforegno konkerita de la kristanoj, vi povas ankoraŭ legi 33 poemojn verkitajn sur ĝiaj muroj de la lastaj poetoj de Al-Andalus. Jes, la kovriloj de tiu libro, tio estas, la artaj muroj de Alhambro, gardas tiun mesaĝon de kulturo kaj beleco por eterne. Legeblaj estas en la salono nomata *Dos Hermanas* (du fratinoj), inter aliaj, jenajn versojn:

*La pala-portiko belas, kun la arta vob' rivalkas,
kiel lindas la silk-vesto, kiun vi, sentive trafas,
metis sur ĝin por superi la jemenajn tulojn ravajn!
Kiom artas tiuj arkoj per kolonoj subtenataj,
kiujn lumo hel-penetras, kiam ektagiĝo klaras!
Jam proverboj disvastiĝas la belecon tiel altan
de l' marmoro admirinda, en la tuta mondo fama,
kies blanko iluminas per radioj diafanaj
kvazaŭ plenbrilantaj perloj, kiel lumoj lumohavaĵ.*

Dankon pro via atento!

*Antonio Marco Botella,
Zaragozo, aŭgusto 1998*



REFRENO: *Se oni petas vin,
ke vi silentu,
ke vi ankoraŭ esperu...,
Nur al via animo vi aŭskultu
kaj agu.*

Viajn rajtojn vi prenos
neniu povas haltigi
la sencon de historio.
Via forto nova irigos vin
al fino de viaj deziroj.

REFRENO.
Viaj okuloj fajnitaj de larmoj
esperas vane
luneksplojon.

Kion vi faras pri via beleco?
Pri via ardoro?

Ĉu vi scias, kiom da tempo pasas?

REFRENO.
Via juneco? Ĝi mortas
en la deserto de viaj revoj.
Via libereco? Ĝi estas
ĉie en la realo de viaj esperoj
en pagilo de viaj agoj,
en via volo pri vivo kaj ekzisto.

REFRENO.
(Dua kanto en *Djur Gjura: le Défi*.
Mendebla ĉe Hervé Lacroix, 4 Route de
Villeconin, FR-91580 Chauffour les
Etrechy, Francio).

Letero el pasinto (socia vivo)

Homo rangas inter la plej malfortaj bestoj kiuj estas. Antaŭ longe, ni devis serĉi protekton ĉe arboj kiam leono, tigro aŭ preskaŭ ĉiu ajn alia besto venis. Same kiel aliaj simioj, ni havis manojn kaj cerbon. Dum ni nur uzis manojn, same kiel aliaj simioj ni loĝis nur ĉe arboj kaj manĝis fruktojn. Ekde kiam ni komencis uzi la cerbon, ni plibonigis nian vivon. Unue, ni rekonis angoran kaj avertan krion, lernante interpreti bazan informon por nia bonfarto: leono venas, aŭ homomanĝanta besto iras. Jaron post jaro, ni finfine atingis mirindan elpensajon: lingvon. Post tiuj bazaj, vitalaj konceptoj, ni ankoraŭ lernis trapasigi al sekvantaj generacioj tion, kion ni faris, tiujn praktikajn solvojn al danĝeraj problemoj, kiuj minacis niajn vivojn. Post la tempopaso, ni idealigis aktorojn de tiuj anekdotoj, kaj lerta solvo iĝis heroaĵo, lertulo heroigis, ofte eĉ diigis. Ĉar praktikaj bonaj solvoj estis


fundamentaj, oni vestigis ilin per mantelo magia, eĉ religia: gefratoj ne povas naski bebon, ĉar dioj punos la gepatrojn per malsana bebo. Virinon ne povas fekundi pluraj knaboj, ĉar malbono atingos la grupon, kaj tiel plu. Estro devas esti por kontroli stultulojn, kiuj ne respektas lertan regularon, kaj tiel ankaŭ leĝo aperas. Sed estro estas ĉar estas socio, aro de homoj kies fortojn li povas kunigi al bezonata celo. Tial dudek homoj povis venki, kuiri kaj manĝi (kune kun sia tribo) mamuton, besto pli granda ol tiu dudeko da homoj!

Nia speco —same kiel la ceteraj— havas du premojn en sia sango: supervivo kaj nasko, kiujn eble ni povas redukti al unu: daŭrigado

de la propra speco besta. Tial viroj batalas por plej allogaj virinoj montrante tiel, ke la plej forta viro povas fekundi la plej belan inon, nature serĉante pliperfektecon. Naturo havas sian propran *eksperimentan laboratorion*, kvankam ĝi blinde kondukas ĝin, kaj fiaskoj ne mankas. Naturo mortigas ilin, tamen, kaj ĉio estas en ordo, kiel Darvino montris en sia *La origino de specoj*: fascino al geeksterlandano eble estas natura altiro por korekti endogenan malformon, kvankam ĝin kompensas timon al nekonatulo. La *Milito de Troja* ekzemplas la duan kazon, kvankam *Inrabo de Sabinoj* ekzemplas la unuan.

Kiam nasksoifon oni jam satis, aliaj homaj grupoj estas nur konkurenco kaj tiam milito okazas: la emon batali kreas la bezono detruiri tiujn, kiuj forprenos manĝaĵojn el ni aŭ el nia ĉirkaŭaĵo. Tial la naturaj malamiko estas ĉiam najbaraj socioj; sekve milito en antikvaj tempoj estis kruela kaj fina. Kiam homoj vidas sin venkitaj, ili petas kompaton, kaj pli ofte ol ne, nur morton ili ricevas, ĉar oni jam venkis ilin: *vae victis* diris la romianoj (ve al venkito!) Tamen, iam venkinto sentis kompaton al venkito, kaj pardonis lian vivon kaj tiujn de lia familio, kondiĉe ke la venkinto kaj sia familio dumvive laboru por la venkinto: tial sklaveco kreigis, el kompatanta sento. Sekvantaj generacioj de sklavoj tute ne ekzistus, se al la unua oni ne pardonintus la vivon.

Sed kiam socio de homoj pligrandiĝis, la estro tute ne povis kontroli la ceterajn individuojn, eĉ se helpata de konsilantoj, kaj



li devis delegi en anstataŭuloj (inspektoroj, ŝerifoj, vidantoj kaj aŭdantoj, kaj tiel plu). Por eviti maljustaĵojn kaj memprofitojn, li devis krei leĝon, kies interpreton li lasis al juĝistoj. En kelkaj partoj, kiel en Britio, la juĝistoj mem rajtas pligrandigi la leĝon per siaj decidoj, kvankam en aliaj lokoj, kiel Francio kaj Hispanio, juĝistoj nur povas juĝi ĉu oni rompis leĝon jam faritan aŭ ne. Tial en Britio oni povis enkarcerigi la unuan homon kiu komputile elprenis monon el alies bankokonto, dum en Hispanio oni ne povis fari tion antaŭ ol Parlamento aprobis novan leĝon konsiderante tiun kazon kiel kriman.

Iom post iom socio pligrandiĝis, kaj novaj celoj devigis nin serĉi asociojn de asocioj: la grekaj ŝtaturboj tute ne taŭgas de la tempoj de Dario la Persa; do urboj kaj provincoj unuiĝas ĉu laŭvole ĉu pro imperia procezo, kiel ekzemplas faraonoj en Egiptio, Aleksandro la Granda en Makedonio, Aŭgusto en Romio, kaj tiel plu. Neniu en la mondo popolo povis eviti tiun imperian procezon. Poste, lokaj premoj disrompis tiujn imperiojn, sed aliaj kreiĝis, kiel tiu de Karlo Magno en Francio kaj Germanio, aŭ tiuj de la islamanoj en Hispanio kaj Nordafriko. Tiu procezo imperia kaj kontraŭ imperia (nacia) kreiĝis progreson pri arto de milito, kaj pri scienco kaj teknologio. Ni pensu, ke sen la Dua Monda Milito, ekzemple, nuklean energion oni fine atingus, sed pli malfrue ol 1945a, eble jarcenton poste.

Scienco kaj teknologio ne nur mortigas homan vivon, sed ili ankaŭ plidaŭrigas ĝin, kreante malkomforton kaj alitipan danĝeron por la homa vivo. Tute ne por la tero, ĉar nia planedo atingis —dum sia juneco— multe pli duraj kondiĉoj per vulkana aktivado, tertremoj kaj toksikaj gasoj en sia atmosfero. Multaj plantoj kaj bestoj kreiĝis kaj malaperis senrigardataj de tero kaj naturo. Dinosaurioj vivis dum 60 milojn de jaroj, kaj ili malaperis subite, sen risko por nia planedo.

Ĉar ili malaperis, ni simioj havis ŝancon krei nian socion kaj regi la planedon. Ni estas, tamen, nur la aktuala luanto de la

planedo, kvankam ni opinias, ke ĝi estas nia posedaĵo. Ni eĉ kreis dion simile al ni, por ke ĝi gracie donacu la universon al ni, senrigarde al fakto, ke formiko sur futbala balono estas giganto kompare al ni, rilate al nia mondo (eĉ pli tiel, rilate al universo!)

Nun ni suferas problemon sekvantan al *demografia bombo*. Mortrisiko en malriĉaj landoj rapidigas naskojn, kaj malsato kaj senespero devigas homojn trapasi Ĝibraltaron surŝipete, kaj eĉ se la plejmulto mortas, sufiĉe da *kontraŭleĝaj* enmigrintoj alvenas en Eŭropon (simile okazas en Usono) kaj veran minacon ili kreas. Senrigarde de kiu venkas tiun maljustan, stultan militon, la problemon tute tio ne solvos: nek okupiĝo de Eŭropo de afrikanoj, nek mortigo de tiuj ĉi fare de eŭropanoj: riĉuloj daŭrige ekspluatos malriĉulojn, kiuj ĉiam perdos ĉiun militon, same kiel Espartako.

Laŭ mia vidpunkto, la nova solvo eble kuŝas en edukada projekto tutmonda. Oni kreu lernejojn kaj universitatojn en la tiel nomita *tria mondo* per mono de riĉuloj aŭ ŝtatoj de la *unua* mondo. Tiel naska bombo malaktiviĝos, kaj la procezo tute maligĝos. Oni kalkulas, ke dum la romiaj tempoj ekzistis nur dek milionoj de personoj en la tuta mondo. Eble tio estas tre malmulte por sekuri la daŭrigo de nia speco, se la nombro stagnas. Sed kvaroblo de tio, eĉ dekoblo, povus esti perfekta nombro: 100 milionoj de homoj vivus en tiu ĉi planedo kvazaŭ ĝi estus Edeno. Neniu ŝtato, neniu mastro, neniu sklavo, nur homio. Bedaŭrinde, mi ne vidos tion, se ĝi iam okazos. Ankaŭ ne mia filoj aŭ nepoj. Sed mi optimiste opinias, ke iam homaro, se ĝi sukcesas sanigi sian aktualan stultecon kungeneritan, povos atingi tiun edenon finfine.

Tial mia artikolo restu kiel letero el pasinto al estonto, al pli feliĉaj kaj inteligentaj homoj ol tiuj, kiujn mi konas.

Elpasinte via,

Isabel Acevedo.

Kongresa temo:

Mediteraneo, ponto inter kulturoj.

Vojaĝante al Montpeliero aŭtobuse mi renkontis plenajn aŭtomobilojn kun valisoj suprenmetitaj. Ili estis de marokanoj, al kiuj mi parolis arabe. Ili ege ŝatis tion. La afero pensigis min pri tiuj tempoj, kiam Mediteraneo estis loko de sama lando: ne estis problemoj por iri de parto al parto; oni havis saman moneron, saman lingvon. Tiam oni povis vojaĝi el norda Irako al Skotlando ene de sama unu kulturo. Tiam estis granda sola kulturo, granda sola ŝtato, kaj sama juro.

Tiel enkondukis la kongresan temon itala profesoro pri semidaj lingvoj Fabrizio Pennachietti. La temon prezentis kvar prelegoj kaj debato. La prelegoj estis: 1 *Enkonduko*, 2 *Kulturo kaj historio (Malto, Mare Nostrum kaj Al-Andalus, brila mediteranea ponto inter kulturoj)*, 3 *Izraelo/Islamo* (prelegoj kaj debato) kaj 4 *Tamazirto (Berberoj); alia mediteranea kulturo, kaj konkludoj al kongresa temo.*

Nekompreneble, la debato ne okazis post la lasta prelego, sed inter la unua



kaj la dua (sub titolo *LA-oj en Mediteraneo*). La debatantoj estis ĉefe el mediteraneaj landoj, kvankam ankaŭ partoprenis alilokanoj. Katalunoj petis dufoje esti internacie agnoskita de UEA, por ke ili povu havi subtenon de sia registaro komunuma. Ili plendis, ke siaj *kulturo kaj lingvo estas katalunaj*, sekve ili petis de UEA, ke ili agnosku Katalunion kiel landa asocio. Representanto el Valensjo diris, ke estas tri diferencaj asocioj esperantaj en Katalunio: KEA, KAE kaj HEF, kaj li demandis pri kiu reprezentas al katalunaj esperantistoj. Al kiu el la tri UEA devas agnoski kiel sian landan asocion (tamen, ĉar HEF jam estas agnoskita, ĉiu kataluno volante esti agnoskita de UEA povas aliĝi HEF, se li aŭ ŝi ankoraŭ ne faris tion). Pri tio, kio katalunino diris, ke la katalunoj havas propran monon, la valensjano ne reagis¹. Ĉar mi ne konsideris tiun lokon aŭ momenton taŭgan por diskuti la aferon, mi ne aldonis plian argumenton. Tamen, loĝante mi en urbo kreita de muslimoj en Hispanio dum la oka jarcento, Mursjo, kaj naskiĝinte en la plej malnova urbo de Eŭropo —fondita de feniksoj je sia enirloko en Eŭropo—, Cádiz (Gades), mi petas, ke se oni agnoskas naciajn privilegiojn al Katalunio, oni pli rajtigue devas ankaŭ agnoski tiujn privilegiojn al Murcia kaj al Andaluzio, kies kulturoj estas egalvaloraj al tiu de Katalunio, se ne pli valoraj: Ibn Arabi, Avisena kaj Averroes estis intelektuloj famaj tra la tuta mondo multe pli frue ol oni povus revii pri iu kataluna kulturo.

S-ro Korsetti rekondukis la temon al Mediteraneo kaj kelkaj ĉeestantoj

¹Vidu noto je la fino de la artikolo, p. 27-a.

plendis pri kial la kongrestemo devas reduktiĝi al Mediteraneo, kaj ne al aliaj kulturoj, kiel la belga aŭ irlanda. Samideano de Britio diris, ke pontoj bezonas kolonojn, kiujn povus alporti aliaj kulturoj eĉ se ili ne troviĝis en la Mediteraneo mem. Alia interesa temo estis larĝigo de la temo, ĉar ne nur estas norda kaj suda Mediteraneo, sed ankaŭ orienta kaj okcidenta. *Nordo kaj sudo diferenciĝas ĉefe mone* —oni plendis—, *sed oriento kaj okcidento diferenciĝas filozofie, kaj tio estas pli grava diferenco*. Alia grava konsidero en tiu renkonto estis kial estas tiom malmulte de esperantistoj en Afriko. Aŭgusto Kaskero diris, ke iam, disdonante librojn kaj helpmaterialon al samideanoj de la tuta Afriko, oni konstatis, ke plejmulto el ili estas eŭropanoj, kiuj loĝas en Afriko. Kiel oni vidas, je tiu debatoj oni ne povis konkludi pri la temo kongresa, sed konsideri okaze de ĝi, pri taŭgeco de la temo. Mankis al ni klarvido distingigi inter *kulturo* kaj *civilizacio*, du vortoj uzitaj tra la kongreso kiel sinonimoj, sed kiuj vere estas antonimoj.

La kvinan de aŭgusto estis triprelega sesio: ni aŭdis pri la **Historio de Malto**, dirita de S-ro Carmel Mallia, kaj pri **Mare Nostrum**, dirita de nederlanda S-ro Gerit Berveling. La unua substrekis la grandan gravecon de la Kavaliroj de la Ordo de Malta kaj Napoleono en la historio de sia lando, dum la dua, aŭtoro de la **Antologio latina** ĵus eldonita de





UEA, rakontis la historion de la Romia Imperio, kaj kiel la Mediteraneo iĝis *Mare Nostrum* (maro nia). Interesa klarigo estas tio, ke Romulon kaj Remon

(fondintoj de la urbo Romo) nutris lupino. Sed tiatempe *lupino* estis eŭfemismo por putino... Je la fino de la prelego vietnamo klarigis sian opinion pri la mediteraneaj kulturoj kaj Romia Imperio.

Antonio Marco Botella ne povis prelegi, kiel anoncite, pri *Al-Andalus, brila mediteranea ponto inter kulturoj*, ĉar li estis malsana en hospitalo. Tamen, li sendis sian prelegon, kies kopion mi legis, kaj bedaŭras, ke li mem ne povis legi ĝin al ni, ĉar ĝi priskribas brile kaj klare la paŝojn kiuj mediteraneaj kulturanoj sekvis al eŭropa lando, kiun ili transformis kune kun ties enloĝantoj kreante novan kulturon, pli kompletan kaj pacan, kiu funciis kiel vera ponto inter kulturoj mediteraneaj, kaj kiun malfeliĉe detruis netoleremo fanatika kristana. Oni povas legi sian interesan prelegon en paĝo 5-a de ĉi tiu *Kajero*.

PRELEGDEBATO ISRAEL/ISLAMO.

Komenciĝis la sesio post dek-minuta prokrasto, pro ne ĉeesto de islamano kiu devis debati kun S-ro Jozefo Ŝemer, izraelano. La titolo de la restanta prelego estis *Rolo de Mediteraneo, rigardita de okuloj de klera izraelano*. Sed, ĝi fakte estis prezento de la nuna stato de la ŝtato de Izraelo. La prelego ne estis altkvalita, kaj lasis multe da temoj neresponditaj kaj —laŭ mia vidpunkto— ne respondeblaj. La preleganto

ne citis alian aŭtoritaton ol sian propran sperton kiel israelanon, sed ne uzis ian ajn statistikon, citaĵon el gravulo politika, psikologia aŭ scienca el sia lando. La sola dokumento alportita de li al ni (skemo pri sia prelego), estis verkita tute en la hebrea



lingvo! Aldone, lia prelego estis nur sia persona sperto kaj opinioj. Bizare estas, ke li parolis pri du *etnoj*, judoj kaj araboj. Nu, *judo* ne estas raso aŭ etno, sed ĉiu, kiu adoras Dion laŭ mosea maniero, kaj *arabo* estas naskito en Arabio, kiu ne apartenas al Izraelo, evidente. Resumante la prelegon laŭ mia interpreto, ekzistas Ŝtato Izraelo, kies enloĝantoj diferenciĝas laŭ siaj religioj: ekzistas izraelŝtatanaj judaj kaj izraelŝtatanaj islamaj, kaj tiu religia diferenco estas tiel grava, ke renkontiĝo inter tiuj du specoj de civitanoj estas tute neebla. Estante la izraelŝtatanaro direligia, oni ne sukcesas kompreni, ke la vera, fakta konstitucio de la lando tuta estas la *Sanktaj Skribaĵoj* de unu el la du religioj. Sed S-ro Ŝemer neis tion: li diris, ke *Izraelo ne havas konstitucion* (sekve ĝi ne povas laikiĝi). Ankaŭ li diris, ke *integriĝo ne eblas ĉar araboj* (stranga nomo por palestinanoj) *ne volas integriĝi en tiu kulturo de la plimulto (juda)*. Li ne menciis, ke kiam Abrahamo venis en la landon (antaŭ preskaŭ 7 000 jaroj) *filistoj* (praavoj de palestinanoj hodiaŭaj, kaj sekve la sama popolo) jam estis tie. Kiam la romianoj ekspelis judojn el teritorio de la nuna Izraelo, palestinanoj restis tie dum ankoraŭ du mil jaroj ĝis kiam la angloj kaj francoj devigis ilin akcepti la alvenon de judoj el la tuta mondo. Nun oni plendas, ke sepmiljaraĝa tradicio kaj kulturo ne *adaptiĝas* al okcidentema viva kaj pensa maniero perforte, ke oni starigas getojn por popolo diversa al sia, kaj kvankam palestina lingvo (araba dialekto) estas unu el la tri oficialaj en la lando, ĝi estas la sola nedevige lernata kaj parolata. Krom la hebrea, la angla —eble pro sia enradikiĝo en la hebrea kulturo— ja estas deviga!

Tamen, S-ro Ŝomer avertis, ke ni esperantistoj tute ne devas timi pri nia kongreso de Tel-Aviv en la jaro 2 000: ĉio estas kontrolita, kaj *dum la pasintaj kvin jaroj okazis pli da bomboeksplodoj en Parizo ol en Tel-Aviv... Estas multaj ĵurnalistoj en*

Izraelo kaj ili troas aferojn por disvendi siajn ĵurnalojn...

Similan plendon pri ne interkultura alproksimiĝo faris Katrin Texier la sekvontan tagon, parolante pri problemoj ĉe Berberio, norda parto de Alĝerio. Sed tiukaze kulpuloj, ne viktimoj, estas araboparolantoj. Fakte tiuj ĉi ĵus malpermesis uzon de la berbera kaj de la franca lingvoj en la lando. Kvankam ŝi eraris pri disvastiĝo de lingvo berbera (Kanariaj Insuloj neniam parolis ĝin, kvankam erudiciuloj subtenas, ke la iam parolita *gūanĉa* lingvo parencas al la berbera), sendube ŝia prelego estis interesa kaj valora por kompreni kial Mediteraneo ne estas ponto inter kulturoj: naciismo kaj viktimismo malhelpas tion.



Fabrizio Pennachietti finfine eliris kelkajn konkludojn por ni pri la Kongresa Temo. Li diris, ke laŭ Mediteraneo ekzistas multaj miljaraj kulturoj, kiuj iam unuigis sub regado de romianoj, farante tiel la *Mare Nostrum*, ponto inter ili; sed nun ili apartigis denove. Esperanto verŝajne povas funkcii kiel nova ligilo inter ili ĉiuj, sed estas ankoraŭ multe da laboro por atingi tion.

La sekvontan tagon, dum la Fermo de la Kongreso, S-ro Reto Korsetti komentis la temon ankaŭ tiusence.

*Montpeliero, la 2-an al 7-a de aŭgusto
de 1998*

Jesuo de las Heras

NOTO.—

!Ĉe se ĝi estis lingvoperforto: la nomo *peseto* estas kataluna vorto, ĉar diminutivo de *peso* en la hispana estas *pesita*, sed la kataluna diminutivo ja estas *peseta*. Sed tiu monero estas oficiala mono en la tuta Hispanio, ne sole en Katalunio (al kiu —pro amo— mi preferas nomi **Katalunjo**, kio ankaŭ konformas pli al la originala nomo en la kataluna prononcado de tiu vorto). Do, paroli pri *propra mono* parolante pri Katalunjo, mi opinias ke estas tute frenezaĵo, aŭ emo al mensogo.

Andalusa muziko

Interesan libron mi ĵus legis, kiu entenas la temon mankantan en nia lasta Universala Kongreso. Kiel povis okazi, ke estante ĝenerale konsiderita ankaŭ universala lingvo, muziko ne estis menciita kiel ponto inter kulturoj?


Christian Poché estas siro el Alepo, kiu fakiĝis pri etnomuzikologio, kaj per tiu libro, *La musique arabo-andalouse* (majstre enhispanigita de Beatriz Martínez del Fresno), li montras grandan preparon pri tiu temo. Li priskribas tion, kio andalusa muziko estas: tiu muziko kreita en Al-Andalus de muslimaj hispanoj kaj poste disvastigita laŭ la nordo de Afriko kaj influis al la tuta Mediteraneo, ĝis la orienta parto. Poste li priskribas historion de tiu muziko ĝis hodiaŭ; li pristudas la muzikon poezion kaj iliajn diversajn interpretojn, kaj li finfine venas a la *nūba* aŭ nuubo, vera sinfonio en kiu kanto ĉiam elstaras kaj kies vortojn oni ĉiam komprenas, ĉar aliel la muziko ne estus andalusa. Ni lernas pri malsamaj skoloj de nūba: la

maroka, la alĝera kaj la tuniza, la plej kompleta kaj la sola kiu reiris al mikrotonalismo araba. Finas la libro per ĉapitro dediĉita al poezia enhavo de nuubo.

Nuubo estas la kerno de andalusa muziko. Ĝi estas suito kanta kaj instrumenta de diversaj poemoj, kiujn interludas fragmentoj sole instrumentaj, liberaj aŭ mezuritaj. Tiuj poemoj estas *mohaŝaho* (brodo, tio estas, ornamita poemo), *zeĥel* (andalusa popolpoemo, *sugl* (laboro) kaj *barwal* (popolkanto). La tuton enkondukas unu aŭ du instrumentaj enkondukoj. Muzikistoj kantas nuubon ĥore, sed *heterefone*, tio signifas ke ili intermiksas siajn voĉojn. Ne ekzistas paŭzoj inter la poemoj generantaj la nuubon., kaj la tutan nuubon difinas sia *tab'*, tio estas, sia **modo**. Modo koherigas kaj identigas ĉiun nubon, kaj laŭ sia modo ekzistas dek unu apartaj nuuboj en Maroko, dek du en Alĝerio, kaj dek tri en Tunizio. Tiuj



Influo de andalusa muziko



tri tipoj de nuuboĵ malsimilas laŭ siaĵ esprimado kaj stilo.

Andalusia muziko influis la tutan mediteranean landaron, kaj influon de la nuubo oni vidas eĉ en ĥina muziko. Aliflanke, kiam franco Pierre Attaignant publikigis siajn *Suyttes de bransles* je la jaro 1547-a, evidentas, ke li kopiis la koncepton de nuubo, kaj tiel pruviĝas, ke la andalusia nuubo influas ankaŭ la okcidentan muzikon; krome de la fakto, ke ĝia abundeco de pure muzikaj interludoj anoncis niajn simfoniojn. Do, ĝi estis pramodelo de ŝiito kaj simfonio. Kiam Beethoveno aldonis ĥoron al sia *Naŭa Simfonio*, lia *revolucio muzika* estis nenio pli ol reiri al nuubo, eĉ se li ignoris tion. La afero estas impresiva, se oni konsideras, ke nuubon oni kreis je la jarcento 9-a! Dum tiu jarcento Ziryab venis al Andalus kaj -fororgesante mikrotonojn arabajn- li unuigis araban

tradicion kune kun gotromiana diatonismo, kreante tiel la andalusian muzikon en Kordovo.

Por ke la leganto havu nur abstraktan ideon pri andalusia muziko, la libro enhavas kompaktan diskon, kiu entenas 17 fragmentojn de nuuboĵ diversstilaj, kio rabatas ege la prezon, kompreneble, farante ĝiajn 2 400 pesetojn (15 eŭroj) tute malŝpareblaj se oni interesiĝas pri muzika aŭ mediteranea historio. Bedaŭrinde, la libro ankoraŭ ne estas en Esperanto, sed nur en la franca kaj la hispana.

BIBLIOGRAFA NOTO: *La música arábigo-andaluza*, de Christian Poché. Akal, 1997. Madrid. ISBN 84-460-0791-6.

Venas el paĝo 30-a (sociala salajro)

Ĝenerala assekuro bezonas ĝeneralan kontribuadon. Iun procenton de la rento de ĉiuj, eĉ de la salajruloj, de la plej simpla laboristo al la plej granda potenculo.

Provizore, fronte al la globaliĝo de la financoj kaj iaj konsekvencoj, kiuj akriĝos la socialan problemon, la plej atingebla sociala rimedo estas la sociala salajro. La kerna afero estas organizi la socion en la sociala aspekto kaj prepari la mensojn kaj la kulturon por envojigi la planediĝon ĝis la unuigo de la homaro, kio esence estas la interna ideo de Esperanto.

La vivado en solidareco estas pli alta civilizacia sociordo, kaj krom aliaj sociaj problemoj kiel la paco, ekonomiaj krizoj, solveblaj nur per la unuigo de la homaro, la sociala salajro povas esti antaŭpaŝo al pli humana socio.

Aŭgusto, 1998

Giordano Moya.

Sociala salajro

Estas fakto, ke nuntempe pri la socialaj ideoj regas skeptikismo. Oni ne atentis pri socialaj ideoj.



La socialaj ideoj naskitaj meze

de la pasinta dekaŭna jarcento ne sukcesis praktike ĉe la fino de nia dudeka jarcento. La marksismo fiaskis en Sovetio. La anarkiismo restas kiel nura atestanto. La kapitalismo en ĝia aspekto de libera merkato estas hodiaŭ en plena disvolviĝo tra la tuta mondo en fazo de financa planediĝo.

Tute libera merkato, sen monopoloj, akriĝas la konkurencon, instigas la teknikan disvolvi on, multigas la produktadon kaj fine reduktas la plusvaloron. Tamen, en kontraŭaj aspektoj, la financoj superregas enkadre de potencaj bankoj kaj financistoj. Alie la konkurenca merkato kunportas grandajn elspezojn en propagando kaj la praktika monopolu de la internaciaj financoj kaj kelkaj transnaciaj entreprenoj. Antaŭ tiaj cirkonstancoj la laboristoj ankoraŭ restas organizitaj nacie kaj fariĝas senpotencaj antaŭ tiuj novaj cirkonstancoj. Ili apenaŭ povas fari nenion. Tiel

same okazas al la individuaj kaj malgrandaj entreprenoj. Tiuj entreprenoj, kiuj here-diĝis de la patroj al la filoj tra generacioj preskaŭ malaperis. Multaj entreprenoj ordinare nur daŭras malpli ol dudek jaroj, kaj kompreneble tiuj entreprenoj ne garantias porvivaj laborlokojn.

Certe la vivnivelo en la industriaj landoj estas nuntempe pli alta ol neniam antaŭe, sed pliiĝas la diferenco inter la riĉaj kaj malriĉaj landoj kaj ankaŭ inter riĉuloj kaj malriĉuloj de la propraj riĉaj landoj. Ekzistas sendungeco, mankas la sekureco de laborlokoj kaj tiuj fariĝas pli kaj pli eventualaj.

Solvi tiujn socialajn problemoj estas tre malfacile. Ili bezonas tutmondan agadon akorde kun la ekonomia planediĝo. Monda organizo ne sekvas la financan planediĝon en iuj socialaj aspektoj. La mondo restas disigita en suverenaj ŝtatoj. La sindikatoj ankoraŭ estas naciaj. La esperantismo, kiu povas unuigi la homaron restas stagna kaj amorfa pri socialaj aferoj. Dume, kion oni povas fari?

Nuntempe estas sufiĉa kapablo de produktado, des pli profitante la disponeblan laboradon de la sendungitoj, por stabli organizitan soli-

darecon fronte al iuj eventualaj oĝoj de la vivado.

La laborista luktado por pliiĝi la salajrojn restas vana, ĉar ĝi nur kontribuas al la mona inflacio. La reduktado de laborhoroj ne solvos la sendungitecon, ĉar ĝi plialtiĝos la prezojn kaj pro tio ĝi reduktas la aĉetkapablon kaj generas plian sendungecon. Tio farenda estas pliiĝi la sekurecon enkadre de la solidareco, fundamento de kohera kaj justa socio.

Tio farebla estas la sociala salajro aparta de la labor-salajro. Tio garantios ĉiujn kontraŭ mizero en la abundeco. Ni imagu socialajn salajron por ĉiuj de la naskiĝo ĝis la forpaso. Ĝi estos helpo al la gepatroj por la infanoj, permesos longan instruadon al la gejunuloj, zorgos alfronte eventualan sendungecon, estos asekuro por la maljunuloj kaj plie ankaŭ estas asekuro por ruinigitaĵaj entreprenistoj.

Kompreneble, ĉiuj devas kontribui al la monaj rimedoj por subteni tiun ĝeneralan sekurecon. Se oni ŝarĝas la entreprenojn per plia impostado, tiu impostado plialtiĝos la prezojn kaj en tutmondo komerca konkurenco ĝenos la disvendado kaj generos pli da sendungeco.

Verkante, pensante

Ĉu ci, estimata leganto, iam konsideris tion, ke **La Biblio** estas la plej vendita libro tra historio? Mi kredas, ke tio obeas al kelkaj tre difinitaj kialoj:

- 1 La libro estas tre grava por dikredantoj, kiuj estas multaj: tiuj kredas, ke la aŭtoro de la libro estas Dio Mem.
- 2 Ankaŭ ili kredas, ke ĉio en la Biblio estas vera. Ni provas klarigi memevidentajn stultaĵojn kaj mensogojn, dirante ke *dio parolas hiperbole por tiuj mensoj semidaj arkaikaj*. Sekvo de tio estas, ke kredantoj devas engluti interpretojn de profesiaj religiuloj, se ili ne volas havi problemojn kun Dio.
- 3 **La Biblio** estas tre varia. Fakte, ĝi ne estas unu libro, sed sepdek du. Unu el ili prezentas la *dian* interpreton de la origino de homo, peko —ja revolucia elpensajo!— kaj pri la unua hommortigo; alia libro parolas pri leĝoj (*Deŭteronomio*), alia, pri amo kaj poezio (*Psalmoj*), alia pri militoj (*Makabeoj*), kaj tiel plu. Do, oni povas konkludi, ke grava trajto por bonega disvendado de **La Biblio** estas ĝia *varieco*.

Do, gravaj trajtoj estas, kiel jam menciite, *graveco* de la aŭtoro, kaj *vereco*. Tio kontraŭagas malbonan trajton

rilate al divastigo libra, kio estas *dikeco* (sinonimo de *tedo* ĉi tie).

Oni povas konkludi, kiel plua vero el **la Biblio**, ke por ke verko disvastiĝu, ĝi devas konformi laŭ —almenaŭ— kvar trajtoj: *graveco* de sia aŭtoro, *varieco*, *vereco* (almenaŭ *ŝajna*, ni revenos al tio) kaj *maldikeco*. Kompreneble, tiuj trajtoj estas relativaj. Ekzemple, se ci ne ŝatas poezion, *Kanton de Kantoj* (Laŭŝajne verkita de Reĝo Salomono de Izraelo), ci konsideros dika, kvankam ĝi estas nur kvin-

paĝe longa! Male, se ci amas la hispanan lingvon kaj literaturon, ci ne opinios, ke **Don Kihoto** estas dika, malgraŭ siaj pli ol mil paĝoj. Ankaŭ helpas maldikigi longan libron arta uzo de la skribo mem, kaj konekto de la aŭtoro kun la legantoj, pere de la skribo mem. Kiel oni povas vidi, *dikeco* kaj *tedo* estas interkonektitaj, ni diru, ke ili estas la du flankoj de sama monero.

Vereco ne volas diri nepre, ke oni rakontas verajn okazaĵojn. **Mil kaj unu noktoj** (ankaŭ nomita **Orientaj noktoj**) rakontas aferojn pri homoj el diversaj profesioj kaj feoj, princoj, kaj tiel plu, kiuj evidente ne veras. Sed *dum la leganto lernas pri ili*, li aŭ ŝi vivas la rakontojn kiel veraj, tio estas, dum tiuj momentoj *tiuj aferoj veras por li aŭ ŝi*. La nekonata aŭtoro aŭ aŭtoroj de tiu li-



Jen leĝaj tabuloj!

bro longa kaj mirinda ludas per deziro kaj fantazio de la leganto por kredigi sian rakonton, kaj tio estas sana ĉar kiam la legado jam finis, la ensorĉo ĉesas, kaj leganto reiras al reala mondo, kaj komprenas, ke ĉio ne veras. Sed li aŭ ŝi ĝuis la legadon, kaj tio estas sukceso por aŭtoro. Aliflanke, rakonto pri vera afero, kiel ekzemple insekta vivo, povas dikiĝi ege, se la leganto ne interesiĝas. Vera

grava..., ĝis kiam oni malfermas la libron mem. Se le enhavo de la unua paĝo estas interesa, oni povas legi ĝin ĝis intereso ĉesas. Se tio ne okazas antaŭ la fino, la verko estas interesa, evidente. Se la enhavo estas peza, la graveco de Hila-ri ne estas graveco de aŭtoro, sed eksterliteratura. Aliflanke se nekonatulo sukcesas, ke oni



Maro
sfaras
antaŭ la
filoj de
Dio.

u egiptoj ne difilinumitas?

artisto povas, tamen, eĉ tion maldikigi, kiel Isaac Asimov pruvis per siaj libroj pri scienco kaj historio. Ekzemplo pri tio estas sia dika sed interesa libro **La universo**. Kio estas lia sekreto? Alproksimigi la temon al leganto, kompreneble.

Pri *varieco* ne estas multe por diri. Eĉ se oni parolas pri ununura temo, oni povas konsideri ĝin el diversaj flankoj aŭ vidpunktoj. Ekzemploj ankaŭ helpas. Ĉiukaze, estas malmulte de temoj kiuj ne rilatas al aliaj temoj.

Kaj mi venas al la plej tikla afero, *graveco de aŭtoro*. Tio ne volas diri, ke la aŭtoro devas esti gravulo. Se Hila-ri Klinton, ekzemple, verkus libron, ĝia intereso povas esti relative

malfermu sian libron, kaj se oni estas kaptita de tio, kion la libro diras, ĝis la fino, la aŭtoro graviĝas per tio kaj eniras Olimpon de Gravaj Aŭtoroj por la koncerna leganto, kiu eble rekomendos tiun aŭtoron al siaj amikoj kaj konatuloj. Tio okazis al Conan Doyle (konan doyle) kaj al ĉiuj aliaj aŭtoroj, ĉar kutime ili estis nekonatuloj dekomence...

Mankas aliaj gravaj karakteristiko de legindaj skribaĵoj, sed mi parolos pri ili alian tagon. Estu nun mia celo verkante tiun ĉi artikolon konvinki al ci, kara leganto, ke ci ankaŭ povas verki artikolon.

Olga López

Himnoj, (okaze de la Himno de Okcitano)

Kiam la internacia Kongresa Ĥoro koncertis kadre de la 83-a Universala Kongreso de UEA, mi ne volis kredi mi-ajn orelojn, kiam mi aŭdis interpreton pri *Himno de Okcitanio* kantitan ne nur de nia ĥoro, sed ankaŭ de preskaŭ tuta la ĉeestantaro. Ŝajnis, ke la esperantistoj akordigis kun tiu sinteno de subpremado,

la Marseljeson en Esperanto (ankaŭ mi ne sciis ĝin en la franca). Do mi devis kontentigi min kriante *Vive la France!*

Sed *La Marseljeson*, kvankam simbolon de *centrismo* Francio, oni tute ne povas rigardi kiel simbolon subpremantan. Ni konsideru tion, kion ĝi diras:

kiujn tiuj tiel nomitaj *subpremataj popoloj* el la mondo kutime havas. En la plej centriska lando de la mondo. Lando, kiu akceptis nin esperantistojn sindoneme kaj gasteme. Mi dubas ĉu Okcitanio estas subpremata lando. Mi ankaŭ dubas, ĉu okcitanoj estas popolo. Bezonas oni pli ol havi apartan lingvon por esti popolo.

Por kontraŭi tiun —laŭ mi— sensencaĵon, mi bedaŭris, ke mi ne sciis

*Ni iru, infanoj de l' patrio,
la tag' de gloro alvenis jam!
Kontraŭ ni de la tiranio
Flago sanganta levis sin (2)
Aŭskultu vi dum la kampanjoj
Muĝi la bestaj soldatoj
Dum rabante viajn infanojn
sufokante ilin laŭ sia plezuro.
REFRENO:
Al armoj, civitanoj!
Formante batalĵonojn!
Al arm', al arm'!*

Malpura sang'
inundas la kamparon.

II

Kion volas ĉi sklava hord"?
perfidistoj, komplotaj reĝoj?
Por kiu tiuj nenoblaj kaptiloj,
feroj longtempe pretigitaj? (2)
Francoj, por ni! Ve, kia ofendo!
Kian senton ĝi devas levigi?
Nin oni kuraĝas mediti
meti je antikva sklaveco!

[REFRENO]

III

Ĉu fremdaj kohortoj
leĝigos ĉe niaj hejmlokoj?
Ĉu salajrataj falangoj
faligos niajn fierajn militistojn?
Granda Dio..! Per ĉenitaj manoj
ĉu niaj fruntoj plorus,
malnoblaj despotoj iĝus
mastroj de niaj destinoj?

[REFRENO]

IV

Tremu, tiranoj!, perfiduloj
malaprobo de ĉiuj ajn.
Tremu!, viaj patrmortigaj planoj
finfine ricevos sian pagon.
Ĉio soldatas kontraŭ vin.
Se ni falas, junajn heroojn
la lando denove produktas
kontraŭ vi pretigitaj por bati.

[REFRENO]

V

Francoj!, en grandomilitiste
portu aŭ haltigu viajn botojn,
savu tiujn tristajn viktimojn
armitajn nevole kontraŭ ni,
sed despoton sangavidan,
kaj komplicon kuiritan ĉe ni,
ĉiun tigron kiu, senkompatе,
ŝiras enon siapatrinan.

[REFRENO]

VI

Amo sakra al patrio,
gvidu levi venĝeman brakon nian.

Libereco, kara liberec'
batalu inter viaj defendantoj.
Sub niaj flagoj, venko
asekuru vian fortan akcenton,
ke viaj mortantaj malamikoj
vidu vian venkon kaj nia gloro!

[REFRENO]

Mi konkludas gvidante vian atenton al fakto, ke kanto kontraŭ tiraneco ne povas esti rigardata kiel tiraniigo. Okcitanio neniam estis pli grava ol kiel parto de unu el la plej gravaj landoj el la mondo. Lokalaj estroj ofte subpremas samlokanojn, kiel historio atestas. Fakte naciojn oni elpensis por fini feŭdistojn. Malhistoriistoj nunaj volas ripeti historion, kiel oni vidis en Bosnio kaj aliaj parto de la mondo. Himnoj estas vere nenio, krom respegulaĵo de faktoj pasintaj aŭ estantaj. La himno de Okcitanio estas kanto de amo. *La Marseljeso* estas kanto de ribelo sangosoifa, sed kiu signalas kaŭzojn de tiraneco kaj subpremado, kaj ĝi ankaŭ signalas la vojon por liberigi sin de tiu subpremo, ne nur plendo, por ke dio aŭ alia fantomo liberigu nin. Kutime ni devas solvi niajn problemojn. Mi ankaŭ ne komprenas kial nia ĥoro ankaŭ ne kantis la solan kanton kiu portas la nomon *La internacia*. Oni diris al mi, ke oni ne devas *fari politikon*, sed ĵus tio estis, kion ni faris en Montpeliero irante tien. Ni montras praktike, ke internacia ilo funkcias bone, kaj tio ankaŭ estas politiko, kio estas *la arto fari bezonaton ebla*. Se oni analizas la vortojn de tiu kanto, oni povas atingi rezoneblajn konkludojn, kiuj estas tre proksimaj al nia celo. Sed tio estas alia kanto.

John Hammer.

Enkonduko en muzikon

Prezento

Post niaj gravaj serioj da artikoloj pri mursaj **Lirikaj Perloj de Andaluso kaj Kutime Faritaj Demandoj**, ni enkondukas novan interesan temon serian, **enkondukon en muzikon**, kiun ni ankaŭ taksas alte pro la intereso de la temo kaj pro la utileco de la afero. Inter ni esperantistoj ne ekzistas tro da muzika sperto kaj kulturo, laŭ mia travivaĵoj, kaj mi esperas, ke miaj artikoloj kontribuas al plenigo de grava truo en nia movado. Se mi eraras tion farante, mi atendas lojalajn korektojn de samideanoj. Aliflanke, mi devos proponi novajn vortojn, ĉar la sola verko, kiun mi konas, kiu tuŝas nian temon, estas **Muzika terminaro kun alfabeto indekso**, de David. G. Hill kaj eldonita de MEL en Sofia je 1992. Bedaŭrinde, ĝi estas verko de brito, kiu apogis sin —laŭ oni eltiras el sia verko— larĝe en la brita tradicio. Male, mi opinias, ke la lingvo de muziko estas ĉefe itala, kaj pro tio oni devas konsideri la italan —ne la anglan— kiel evidentan fonton por terminoj teĥnikaj. Tamen, miaj ennovaĵoj estos malmultaj kaj sufiĉe rezonitaj, por ke oni konsideru ĝiajn oportunecojn.

Mi esperas, ke legantoj de miaj artikoloj partoprenos en diskutoj pri tiuj temoj de mi proponitaj ĉi tie, kaj eĉ se ne ĉiujn komentojn mi publikigos ĉi tie, mi promesas, ke la plej interesaj el ili aperos kun mencio de la aŭtoroj.

Kiom da notoj havas piano?

Tio estas kaptila ridindigaĉo! Mi esperas, ke neniu el vi falu en ĝin... Piano havas... sep notojn! Kial nur sep? Bone, ekzistas nur sep notoj. Piano havas multajn **sonojn**, sed notoj estas nur sep. Tio estu nia unua leciono. Kio estas noto? *Notoj estas grafikaj signoj kiuj esprimas muzikajn sonojn kaj difinas iliajn tesiturojn kaj daŭrojn*. Ni parolos pri daŭro poste, sed nun klarigas, ke **tesituro** estas la *muzika alteco de notoj*, tio estas, kiom altaj aŭ akutaj ili estas. Notoj havas sep nomojn, laŭ siaj relativaj tesituroj: **do, re, mi, fa, sol, la** kaj **si**.

Tiuj nomoj estas multe pli kanteblaj ol tiuj nomoj, kiujn ili ricevas en la angla tradicio: **C D E F G A B**. Kialo estas, ke kiam oni lernas muzikon en Britio kaj aliaj landoj, oni kutime ne *kantas*, sed uzas muzikilon —kiel pianon aŭ gitaron— por praktiki la ekzercojn. Rezulto estas, ke dum oni ja povas uzi klavon A aŭ G, oni trovas multe pli kanteblaj silabojn do-re-mi-fa-sol-la-si en la ceteraj landoj, kie oni ne uzas muzikilon, sed la propran voĉon por eklerni muzikon.

Sufiĉas por unua leciono. Venontfoje, mi klarigos kial tiujn nomojn oni elektis por notoj. Ĝis!



Kajeroj

el la Sudo



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

**REDAKCIO: Poŝtkesto 4461,
E30080 MURCIA,
HISPANIO**

**Retskribu al
hale@distrito.com**

<http://www.distrito.com/esperanto/kajeroj.htm>

<http://www.dragonfire.net/~Esperanto/kajeroj.htm>



Depósito legal: Z-2398-88

Presejo: Alegría.